

eLIBRO

András Sütö

Stelo
sur brul-
ŝtiparo

I N K O



András Sütö

STELO SUR BRULŜTIPARO

Dramo en tri aktoj

El la hungara tradukis Jozefo Horvath

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-167-4

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

AUGUSTO 2002

Rolantoj

Johano Calvin

Mikelo Servet

Farel

Ĉefinkvizitoro Ory

De la Fontaine

Idelette

Antono, pli maljuna frato de Calvin

Inkvizicia detektivo

Tribunala servisto I

Tribunala servisto II

La Forge

Veronika

Arzellier

De la Court

Policestro

Perrin

Civitano I

Virino I

Civitano II

Virino II

Sindikato Darlot

Tribunalaj servistoj, provosoj, predikistoj, ĝenevaj civitanoj, ekzekutisto

UNUA AKTO

UNUA BILDO

Luĉambro de Johano Calvin en Parizo. Malriĉa meblaro: ferlito, seĝo, skribotablo, ŝranko, kandelabro kun stumpiĝintaj kandeloj: viktimoj de legado. Sur muro primitiva desegno: ruĝa koro sur etendita mano. Fenestro al strato, turoj de Parizo. Novembro, pluveca atmosfero de la tago de Ĉiuj Sanktuloj. Ekstere manifestacio: kiel melodia akompano eksonas Davida psalmo. Refojas vokoj: "Vivu rektoro Copus!" Sonoriloj sonas, hugenotoj lanĉas la devizon: "Reen al la evangelio!" La juna Calvin — en liaj trajtoj: la rigoro de la posta granda reformatoro, disigata kelkfoje de la tutkora bonhumoro de la juneco — observas la surstratajn eventojn tra la fenestro. Li ne aŭdas la frapon sur la pordo. Enpaŝas Servet leĝere vestita, en lia mano botelo da vino. Li poziĝas oratore, ektusas.

CALVIN *(Turnas sin.)* Servet, ĉu vi vidas kio okazas ekstere?

SERVET Frato mia en la Sinjoro, Calvin! Kio ekstere, sur la stratoj de Parizo fariĝas, estas historia eraro. La universitata junularo festas rektoron Copus ne sciante, ke li verkis la potence fortan inaŭguran parolon per aliula mano,

tiu de Johano Calvin. La voĉo estis lia, ja nur la voĉo: la ideo, la ĉion-renversa kristana filozofio estas tiu de la ĉefenestre meditanta Vulkano (*Montras al Calvin.*), de la Vezuvo preta al nova erupcio. Inkvizitoraj moŝtoj, ĉizu en vian memoron ke en la ĉi-jara tago de Ĉiuj Sanktuloj, en la 1533a jaro de la Sinjoro, la dua ondo de la reformacio ekvojis al Romo. Ĉi ties profanan pompon Luther nur ŝancelis, la mansfelda minista filo nur duone ruinigis, sed la noyona gracila infano devigos ĝin al pompeja sorto. (*responde al la rifiŝa gesto de Calvin*) Ne interrompu min! La hodiaŭa tago, Majesto Francisko, sinjoro Ory kaj monaĥaj fratoj, dominikanoj — domini canes: hundoj de la Sinjoro — karmelanoj, franciskanoj, estas la tago de la purigita evangelio, tiu de la venko de la Instruo levita el la ĉerko de la falsaj dogmoj en la sunlumon! Vivu!

CALVIN Vivu! Se vi nur ne elokventaĉus! Doloras min la oreloj.

SERVET Doloru tiuj de la papo. Pokalon al la ŝatata vino de la festato! Ruĝa. (*Mem prenas du pokalojn el la ŝranko kaj plenigas ilin.*)

CALVIN De kiu vi jam ŝajne ebriiĝis.

- SERVET** Jam en la aŭlo. Pro la sento de venko. Dum mi aŭskultis vin.
- CALVIN** Parolis Copus. Mi — silentis.
- SERVET** Ĉu li parolis? Tondris. Ĉu vi silentis? Avide vi trinkis la efikon de viaj vortoj. Mi observis vin, nekonatan junulon modeste retiriĝintan en la lasta benko.
- CALVIN** Ĉu vi vidis la mirigitajn vizaĝojn? Gape falintajn kanonikajn makzelojn? Vibrantajn submentonojn? *(Ridas.)*
- SERVET** Kaj la flamojn en la studentaj okuloj. Mi preskaŭ alkriis: la orelojn malfermu al Copus, sed la okulojn direktu al la lasta benko! Al tiu pala renversulo. Li mergis vin kiel malgrandajn torĉojn en la fajron de la evangelio ...
- CALVIN** ... en la fajron, en la fajron! ... Papista vortludo!
- SERVET** Mi finis. Dio vivigu vin, Johano!
- CALVIN** Dio vivigu vin, Mikelo! *(Ili intertintigas la pokalojn, trinkas.)*
- SERVET** Lasu brakumi vin, gracilulo! *(Brakumas lin.)*
- CALVIN** Vi ĉiam troigas! Vi estas eterna troiganto.
- SERVET** Ni ne abstinu en la entuziasmo. Vi eĉ ne rakontas, ke tamen vin la reĝino ... Ŝi do scias

... Ho, belega Margareta de Navarra. Vi estas homo feliĉa!

CALVIN Ĉu pro la gratulo de la reĝino?

SERVET Se iam ankaŭ mi povus kisi la randon de ŝia robo!

CALVIN Mi ĝin ne kisis.

SERVET Mi parolis kun la reĝino nur en songo. Denove mi troviĝis en Aragonio, ie ĉe la piedoj de Pireneoj, apud la rivero — mi kredas — Gallego, niflugadis de la pinto de Aneto al la domo de la avo en Villanova — ja mi havis ankaŭ flugilojn, prunte de Ikaros — kiam mi ekvidis Margaretan. Imagu min!

CALVIN Mi jam diris: kuracu vin pro la songoj.

SERVET Mi same rekomendas al vi kuracigi vin far doktoro Mikelo Servet — pro songokarenco.

CALVIN Mi timas: se por horeto mi dormetiĝas, reŝteliĝas papistaj perantoj, indulgencoj, martiroj, vendistoj de indulgiloj inter Dion kaj la homon.

SERVET Mi havas bonegan dormilon.

CALVIN Kaj kien vi poste flugis?

SERVET Mi descendis sur akvon. Kaj kiun mi trovas ankaŭ tie?

CALVIN Margaretan.

- SERVET** Vi penetras ne nur en mian internon, sed ankaŭ en miajn songojn.
- CALVIN** Ĉar vi ĉiam vagas en malpermesitaj lokoj. Se virino, estu reĝino, se animo: en songo serĉenda.
- SERVET** Via frato Antono refoje denunciis min.
- CALVIN** Li nur rakontis, ke sekrete vi denove seksis homon.
- SERVET** Enŝteliĝinte kadavrejon ankaŭ Michelangelo seksis. Mi do savas Margaretan el la akvo. Portas ŝin surbrake serĉante la ŝtupetaron de Jakobo por savi ŝin el la Tero. Mi ekvidas ŝtupetaron; sur la lasta rungo, en granda alteco brilas via simbolo: batanta koro en la manoj de Margareta. Mi etendas la manon por ĝi, ĉio dissaltas, mi falas, tremas kaj en la malproksimo mi ekvidas ŝin ...
- CALVIN** Ĉu denove Margaretan?
- SERVET** La fajron.
- CALVIN** Kiun fajron?
- SERVET** Pri kiu mi songas lastatempe.
- CALVIN** Do ĝin. Kial vi personigas ĝin?
- SERVET** Pro infanaĝa rememoro. En Villanova dum vesperoj mi ŝatis gapi la kamenon. Potenca fajro flagris en ĝi. Kion vi gapas, fileto? Ŝin

mi rigardas, mi respondis al patrino. Ĉu vi aŭdis kanti fajron? Kelkfoje, kiam ĝi kunfalis, zumetis al mi mallongajn antifonojn. Gaude et laetare Virgo Maria!¹

CALVIN *(Ridas.)* Estis katolika fajro.

SERVET Avo senhezite kondamnis ŝian hugenotan melodion al ŝtiparumo.

CALVIN Ŝin.

SERVET Kiun mi refoje ekvidis, refoje kun Margareta. Ni frostis, tiom ke eĉ nun mi ektemas pro la nura penso. Mi etendis la manon, ho kiel belega kuŝejo, reĝino mia, ĉi tiu flamarbedo povus servi lite por ni, kiam ...

CALVIN Vi vekigis.

SERVET Ne, ne. Iu jam kuŝis en la lito.

CALVIN En kiu lito? *(Observas lin kun plia malsereno.)*

SERVET Pli precize, en la fajro. Fetoro de brulanta karno frapis min. Vidaĵo de ankoraŭ vivantaj, konvulsiantaj internaĵoj, muskoloj, vejnoj; fetoro de haroj, ungoj; blindige blankaj ostoj ŝrumpantaj, knare siblantaj hepato, renoj, baraktantaj pulmoj, flava vizaĝo eksplodinta kiel porcelana vazo, kun du vicoj da

1 Gaude et laetare Virgo Maria (*latine*): Ĝoju kaj gaju, Virgulino Maria!

nigraj dentostumpoj en ĝia subo; ambaŭ okuloj gluglis galantine, poste: simile al du pafilaj fajrogloboj, ili elstridis el la kranio kun la fumo de la cerbo ...

CALVIN Sufiĉas, sufiĉas! Mi esperas, ke estis Ory, la arkimajstro de ŝtiparumistoj.

SERVET Estis mi.

CALVIN Vi malsanas.

SERVET Min mi vidis.

CALVIN Vi malsanas. Ne pro tio, kion vi songĝis. Sed pro kiel vi rakontas tion.

SERVET Eĉ pale mi ne kapablas priskribi tion.

CALVIN Ŝvito vin trabanis. Signe de kia stulta kulposento, Mikelo? Kvazaŭ pro murdo.

SERVET *(kun konfesa rideto)* Mi nur ŝtelis.

CALVIN Ĉu vi ŝtelis?

SERVET Kadavron de sur pendumilo. Ĉu nur al Leonardo permesite?

CALVIN Vi baldaŭ ĉesos tion fari. Vi tro mildas por krudaj sciencoj. Frostotremo ja skuas vin.

SERVET Estis juna, malgrasa hugenoto. Kiam mi tranĉis la ŝnuron, li falis en mian sinon, lia kapo kliniĝis sur mian ŝultron kvazaŭ tiu de dormanta infano.

- CALVIN** Terura, kion vi faras. Sidiĝu almenaŭ al la fajro.
- SERVET** Terura, sed ĉio havas sian prezon. Mi jam troviĝas sur spuro. La sango fluas el la dekstra kamero de la koro en la maldekstran, sed ne rekte: tra longaj vejnoj kaj kontaktante aeron en la pulmoj, ĝi puriĝas. Ĝis nun nur Dio sciis pri tio.
- CALVIN** Vi tro alpaŝis Liajn sekretojn.
- SERVET** Nun jam ankaŭ vi scias tion. Ni opas tri. Jen la Sankta Triunuo!
- CALVIN** Ne peku denove! (*Ĵetas sian mantelon sur la ŝultrojn de Servet.*) Vi tremas.
- SERVET** Dankon.
- CALVIN** La plej mizera vidaĵo estas la homo putranta. Eĉ en florplena ĝardeno kaj plie sur pendumilo! Okupu vin per filozofio, teologio!
- SERVET** Ĉu oni ne sputis fajron al mia libro? Al fuego!² Vere, ĝi ne estus libro, se oni ne krius tuj fajron, ŝtiparuman kritikon.
- CALVIN** Ne defendu, se vi retiris ĝin.
- SERVET** Oni devigis min. De tio originas mia unua premsonĝo. Kvazaŭ mi estus strangolinta la patrinon.

2 Al fuego! (*hispane*): Al fajro!

- CALVIN** Tio estis via eraro, ne via patrino. De trinitatis erroribus³. Nia malamiko estas Romo, ne la Sankta Triunuo. La germanian taglibron daŭrigu!
- SERVET** (*Rezigne gestas.*) Ĉu, kiam la granda Calvin jam laboras pri la potenca sistemo de la kristana religio? Kion mi povus skribi post la Institutio⁴? Restitutio⁵ eble.
- CALVIN** Kial ĝuste Restitutio? Kaj kontraŭ kiu?
- SERVET** Mi ne plu militas kontraŭ iu. Mi timas. Mi plenas de timo.
- CALVIN** Puno de Dio pezas sur vi pro la sekcado. Kaj por hodiaŭ vi restos ĉe mi. La inkviziciaj detektivoj eksentas timon ĉe homoj. Ili havas hundan flarsenton.
- SERVET** Ĉu la reĝino povas ekscii?
- CALVIN** Ke vi ŝtelis homon de sur pendumilo?
- SERVET** Mian songon. Ke kontraŭvole mi prenis ŝin en miajn brakojn kaj portis ŝin al brulŝtiparo. Ĉu oni rajtas puni songon?
- CALVIN** Tio egalas jam frostotremon de timo. Li timas kritikon tamen verkas libron deziratan

3 De trinitatis erroribus (*latine*): Eraroj pri la Triunuo

4 Institutio religionis christianae (*latine*): Institucio de la kristana religio — ĉefverko de Calvin

5 Restitutio (*latine*): Restarigo (t.e. de la kristana religio)

al fajro. Timas instancojn kaj sekcas pendumitojn. Timas la papon dum akre li atakas lin ... Elektu ion por vi, kio ne teruras vin.

SERVET Timindas ĉio, kion homo tuŝas. Dankon por la mirakla mantelo. La frostotremo forpasis.

CALVIN Dank' al Dio. Sed antaŭ krepuskiĝo vi ne elmetos de ĉi tie la piedojn.

SERVET Ĉu tiom frapas la okulojn io sur mi?

CALVIN Se mi rigardas vin, vi montriĝas eĉ tro kuraĝa.

SERVET Trokuraĝa pro la timo. (*Ridas.*) Por kio dankeblas via mantelo. Se mi fondos eklezion, mi deklaras relikvo ĉi tiun porkŝtelilon.

CALVIN Singarde! El kolektantoj de relikvoj fariĝas adorantoj de relikvoj. Sed vi miskomprenis min. Mi ne konsilis al vi fondi novan eklezion, sed verki. Kian eklezion vi volas establi?

SERVET Nenian.

CALVIN Vortoj ne hazarde kroĉiĝas unu al aliaj.

SERVET Estis petolaj saltetoj de la pensado.

CALVIN Kaprioloj de la pensado.

SERVET Strangaj imagoj. Samkiel pri la reĝino. Mi nur ekmeditis pri tio, ke Dio estas ĉie kaj en ĉio ĉeestanta, do ne nur en la Bono ...

CALVIN Sed ankaŭ en la Malbono?

- SERVET** Viaj okuloj ekbrilis. La tigro en vi pretas salti. La senduba. Vi devas esti feliĉa homo, Johano. En mi duboj sennombras. Milito de vermoj svarmas en mia cerbo.
- CALVIN** Defendu vin.
- SERVET** Mi preĝas.
- CALVIN** Sed ne eblas preĝi dubante.
- SERVET** Povas esti. Tamen mi dubas, ke restadejo por Dio povas esti nur la Alto, la Kosmo, la steloj. Li devas esti ĉie-ekzistanta. Sekve li enestas ĉion, kion li kreis.
- CALVIN** Ĉu ankaŭ en ĉi tiu planko kiun ni tretas per la piedoj? Ĉu ankaŭ en Satano?
- SERVET** Viaj demandoj estas timigaj. Laŭ mia kompreno, Li enestas ĉion — potenciale. Kiel, ekzemple, Satano — sen Dia volo kaj aprobo — ne povas fari al ni malbonon, do plenumi sur ni la punon de Dio, vidu la unuan ĉapitron de la Libro de Hiobo kaj tiel plu.
- CALVIN** (*Ridas.*) Vi faris belegan kapriolon. Vi transaltis duoblan abismon per helpo de la suspektinda nocio potentialiter⁶: la panteismon, cetere ne fremdan al vi kaj — kroĉiĝinte al la manoj de Hiobo — la trivialan blasfemon.

6 Potentialiter (*latine*): potenciale

Kiu same ne fremdas al vi, rememoru vian libron! Sed kial vi flankensaltis antaŭ via propra penso?

SERVET Ĉar mi pensas, do mi timas.

CALVIN Vento ne rompas fenditan kanon, ne estingas lumetantan kandelon.

SERVET Vi ne plu timas, vi jam markis al vi la vojon.

CALVIN Ankaŭ vi. Atestas via taglibro.

SERVET Ĉu ĝi plaĉis? Mi ne kuraĝis demandi.

CALVIN Kun plezuro mi legis ĝin. Perfektas la aŭgsburga noto: "Propraokule mi vidis lin, la papon; li portigis sin inter granda pompo, super la kapoj de regnestroj, ŝutadis krucojn per la dekstra mano. La popolo ĵetis sin surteren; konsideris sin feliĉa, kiu povis kisi al li la piedojn. Ho, vi plej malica bestio inter bestioj!" Tielu la parolo! Jen la filum Labyrinthi⁷, ĝin sekvu. Lasu la ŝtelfiŝadon en la akvo de la pensado.

SERVET Ĉu ŝtelfiŝado? Kaj kiu do estas la ĉefluanto de la akvoj?

CALVIN *(kaptinte la Biblion de sur la tablo)* Jen ĝi. Ne ĉefluanto, sed Inspektoro, Direktanto de ĉiuj niaj agoj.

7 Filum Labyrinthi (*latine*): fadeno de Labirinto (t.e. orientilo)

- SERVET** Se mi ankoraŭ verkos ion, denove mi vokos vin al debato.
- CALVIN** Kaj vi denove retiros ĝin.
- SERVET** Sen fanatika amaso, sola kun vi, sur grandega, eĥanta placo — estus streĉe interese.
- CALVIN** Ĉu timigis vin la fanatika amaso?
- SERVET** Vin, eĉ se vi venkus min, mi ne devas timi. La eventualan diverĝon de niaj opinioj ...
- CALVIN** Ĉu eventualan?
- SERVET** ... kompensas la unueco de la koroj. La popolo tuj krias ŝtiparumon. Kun vi mi sentas min sekura; se ni estus solaj. Sen viaj adeptoj.
- CALVIN** Kiucele vi starigas min sur piedestalon?
- SERVET** Ĉar la hodiaŭan tagon pretiĝis via statuo. Kaj laŭ mia prijuĝo: mankis nur piedestalo.
- CALVIN** Dankon, erudicia viro, doktoro Servetus. Mi permesas, ke por refreŝiĝo via moŝto sidiĝu ĉe miaj piedoj. (*Ili ridas.*)
- SERVET** Mi dankas, serenissimus⁸! Ankaŭ mi deziras havi statuon, iom pli altan! (*Ili ridas.*) Ho, ne senmodesto parolas el mi. Mi nur volus esti

8 Serenissimus (*latina*): via moŝto, alparolo de la romiaj imperiestroj

ombrotena bronza branĉo por la heroo de hodiaŭ en la varmega somero. (*Ili ridas.*)

CALVIN Fine vi denove ŝercas, vi frostotremanta erarvagulo!

ANTONO (*Envenas terurita.*) Sinjoro rektoro Copus estas arestita!

CALVIN Pro mia parolo!

ANTONO Je ordono de Ory.

CALVIN Hundoj! Rabiaj hundoj de la infero.

ANTONO Frato, ni fuĝu de ĉi tie. Ankaŭ vi, Mikelo. La studentojn demonstrantajn por Copus oni disbatis per vipoj, la domoj de suspektatoj je hugenoteco estas traserĉataj de armitaj servistoj tribunalaj. Vi bone scias. Oni postiras ankaŭ nian domestron, tenas lin observata, da denunciatoj troviĝas legio; denuncas jam ne nur tavernestroj, sed ankaŭ florvendistinoj. Eĉ muroj denuncas.

SERVET Calvin kaj Mikelon Servet oni vane serĉas. (*Montras al Calvin, poste al si.*) Jen Lucanius kaj De Villanovus.

ANTONO Ni fuĝu!

CALVIN Gravas la vivo de Copus, ne nia pseŭdonimo. Iru, Antono, atentigu ankaŭ sinjoron La Forge, li ŝlosu la dompordon. Kaj mi plendos ĉe

la reĝo kontraŭ ĉi tiuj hundoj de Satano. Kalkulante kun la konsekvencoj, mi jam formulis mian proteston.

ANTONO Sinjoro La Forge havas armilojn. Ĉu mi igu lin kaŝi ilin?

CALVIN Kandeloo, armilo ne tenatas sub buŝelo. *(Li elprenas paperrulaĵon.)*

ANTONO Ne tenatas sub buŝelo. *(For.)*

SERVET Legu ĝin! Al reĝo Francisko, la Unua, nia plej favora savanto ...

CALVIN Lasu nun la ŝercon. Nia Reĝa Moŝto! La aresto de rektoro Copus estas denova makulo sur via glorplena regnado. Permesatu al mi diri senkaŝe, ke via ĉefinkvizitoro Ory malpliigas ĉiutage vian aŭtoritaton ... ja ne konsideriĝas kristana maniero armile persekuti elpuŝitojn de la eklezio kaj malcedi al ili la plej elementan rajton de libera esplorado; ne konsideriĝas kristana maniero mortigi herezulojn, fajre-glave ekstermi ilin; pro opinioj diferencaj de la oficialaj ekleziaj instruoj manifesti ilin malamikoj de la ŝtato; ne konsideriĝas kristana la hipokriteco kiu unuflanke deklaras la konsciencan liberecon, aliflanke donas en la manojn de la inkviziciaj ekzeku-

tistoj tiujn, kiuj prenas ĉi tiun deklaron serioze.

(Pugnofrapoj sur la dompordo.)

SERVET

Ili venas.

CALVIN

Venas. Ne konsideriĝas kristana maniero aresti la liberan esploradon: Libertas scientiae diabolicum dogma⁹! — la plej hontendan frazon de la historio de la homaro deklarantan la liberecon de la konscienco diabla instruo propagandas nun tiuj papistoj kies prauloj lasis sin disŝiri per leonoj en la nomo de tiu ĉi libereco. *(Frapbruo, voko: "Malfermu!")* Jen mi demandas Vian Majeston: kiu volus resti nun kristano, se turko, moslimo, eĉ kanibalo povas promeni inter ni sen ia ajn difekto dum kristanoj tiras sur brulŝtiparon siajn proprajn kunfratojn, dum murdrabisto pli milde punatas ol pensuancoj. Kiu volus resti hodiaŭ kristano, kiam homojn konfesantajn Kriston en Lia nomo oni puŝas sur brulŝtiparon kvankam eĉ inter flamoj ili firme krias sian kredon al la mondo? *(Daŭra frapegado.)* Kiu ankoraŭ volus servi

9 Libertas scientiae diabolicum dogma (*latine*): La libereco de la scienco estas diabla instruo.

Kriston vidante, ke se liaj opinioj ne kongruas ... *(Rapidaj paŝobruoj sur la ŝtupoj.)*

SERVET Ili alvenas.

CALVIN Ili alvenu! Se liaj opinioj ne kongruas kun la instruoj de la SOLE SAVANTA KATOLIKA EKLEZIO, li deklariĝas malamiko de la ŝtato? Kion ni petas, Majesto, nuras: tolérance! tolérance! tolérance¹⁰! *(Li kaŝas la rulfolion en la tirkeston de la tablo.)*

SERVET Tolérance! *(Armita tribunala servisto enpaŝas la pordon kaj enpaŝas post li civile vestita ofi-cisto: inkvizicia detektivo de Ory.)*

DETEKTIVO Tolérance, al kiu?

CALVIN Al la homaro.

DETEKTIVO Ĉu simple ĝenerale?

SERVET Al Hans Blücher. Ni ĵus traktis pri tio, ke la luteranoj en Dresdeno volas bruligi lin ĉar li restas fidela katoliko.

DETEKTIVO Ĉu responde konvenos la cindroj de sinjoro rektoro Copus?

CALVIN Cindroj ne estas respondo.

DETEKTIVO Kiu vi estas?

SERVET Ni estas studentoj de la kolegio Mantaigu, sinjoro Lucanius ...

¹⁰ Tolérance! (*france*): Toleremon!

DETEKTIVO Lucanius. Kaj vi?

SERVET De Villanovus.

DETEKTIVO Armiloj?

CALVIN Ni estas senarmilaj.

DETEKTIVO (*Manosignas al la servisto, ke li traserĉu la ĉambbron.*) La hugenotoj armas sin, endanĝerigas la ekziston de la ŝtato kaj vi, studentoj de Montaigu priploras Hans Blücher?

CALVIN Ni ankoraŭ ne prenis armilojn.

SERVET La herezo estas spirita fenomeno. Per armiloj, bedaŭrinde ne forigebla ...

DETEKTIVO Sed?

SERVET Per vorto de Dio.

DETEKTIVO La vorton de Dio ne malutilas plilaŭtigi per fusilo. Ĉu ne, Luko ... Lucanius?

CALVIN Per fusilo oni plilaŭtigas malforton kaj malkuraĝon. La vorto de Dio sentimas kaj nevenkeblas.

DETEKTIVO Vi do apartenas al la bataliono de la vorto. (*al la servisto*) Ankaŭ kaŝitajn dokumentojn serĉu ...

CALVIN Mi protestas. Mi postulas, ke vi prezentu permeson de la ĉefinkvizitoro pri traserĉo.

DETEKTIVO Kaj kion plian? Ĉu ne la vortojn de sinjoro rektoro Copus vi hazarde ripetas?

CALVIN Mi ripetas la regulojn. Cetere morgaŭ mi denuncos vin al la ĉefinkvizitoro.

SERVET Ili konas proksime unu la alian.

DETEKTIVO Ĉu ankaŭ la papon? (*al la gardisto*) Ĉesigu la traserĉon.

SERVISTO I Jes, sinjoro.

DETEKTIVO Sinjoro Lucanius, ĉu vi permesas al mi sidiĝi al via tablo? (*Sen atendi respondon, sidiĝas, prenas neplenigitan, sed sigelitan mandaton el sia aktaĵo.*) Ĉar ni konformigas la realon al la papero, ĉu ne, la paperon al la realo. Ankaŭ sigelo surhavatas. Por kies nomo ĝi validu?

CALVIN Lucanius ...

DETEKTIVO Lucanius ... En la domo de sinjoro Étienne de la Forge, kiu estas — mi esperas — jam kaptita je la kolo ... Rue Bernardin ... dato kiel supre ... Kaporalo!

SERVISTO I Jes, sinjoro.

DETEKTIVO Vi eliros kun ĉi tiu mandato pri traserĉo, poste vi revenos — laŭregule. Vi vidas, ke kun la sinjoroj ne eblas serĉi. Ili estas parencoj de la papo.

CALVIN Kontraŭe. (*La servisto eliras.*)

DETEKTIVO Ĉu malamikoj?

- SERVET** Negacio sola de konstato ne egalas ĝian konkludon. Do ni ne estas parencoj de Lia Sankteco.
- CALVIN** *(Dum la inkvizicia detektivo volas remeti la plumon en la inkujon.)* Bonvolu mian plumon! *(Prenas ĝin el lia mano kaj ĵetas ĝin en la fajron.)*
- DETEKTIVO** Kio estis tio?
- CALVIN** Infektita aĵo. *(Dum lavas al si la manojn.)* Vi devas koni la regulojn de la publika higieno.
- DETEKTIVO** Ĉu vi konsideras ĥolera min aŭ kion mi skribis per ĉi tiu senkulpa plumo?
- CALVIN** Sinjoro detektivo, interpretu tion laŭ via plaĉo.
- DETEKTIVO** Ni lasu dependi tion de la traserĉo. *(Je frapo sur la pordo.)* Iu venas. Enpaŝu! *(La servisto envenas.)* Kion vi deziras?
- SERVISTO I** Humile mi raportas al sinjoro leŭtenanto, ke mi portis la mandaton pri dom- kaj person-traserĉo. *(Transdonas la dokumenton.)*
- DETEKTIVO** *(Observante la paperon.)* Kun kies sigelo? Ĉef-inkvizitoro Ory. En ordo. Al la interesatoj montru ĝin, ne al mi!
- CALVIN** *(Ne prenas la paperon en la manojn.)* Mi ne intencas duafoje lavi la manojn.

- DETEKTIVO** Sinjoroj. Mi estas inkvizicia detektivo Périgod.
- CALVIN** Do bonvolu inkvizicie detektivi!
- DETEKTIVO** Ni daŭrigu en laŭleĝaj kadroj ...
- CALVIN** La kontraŭleĝaĵon.
- DETEKTIVO** Vidu, Lucanius: ekzistas nek leĝo, nek kontraŭleĝaĵo. Ekzistas nur la Situacio.
- CALVIN** Kaj la aktualaj superregantoj de la situacioj ...
- DETEKTIVO** ... plus armilo kiun sinjoro Villanovus tuj metos sur la tablon.
- SERVET** Mi diris, ke mi ne havas armilon.
- DETEKTIVO** Maldekstre, ĉe la talio, en leda ujo. Intelektuloj estas forgesemaj.
- SERVET** *(Ĵetas sian ponardon sur la tablon.)* Senhaŭtigilo por ranoj, ne armilo.
- DETEKTIVO** Rano, lacerto, testudo! En la mano aŭ pli precize: beko de la fato eĉ testudo povas fariĝi mortiga armilo. Iu intelektulo rakontis al mi — kaporalo, nun ne ĝenu nin per via umado — ke iu kalva greko ...
- SERVET** Aiskulos ...
- DETEKTIVO** Prave. Aglo lasis fali testudon sur lian kapon.
- CALVIN** Espereble, la kazo ne zorgigas la detektivan moŝton.

DETEKTIVO Ĝi nur igas min esti singarda.

CALVIN Ja inter la pluraj faktoroj de la kazo estas donita nur unu: via kalveco. De kie preni nun testudon, aglon kaj Aiskulos al via zorgo?

DETEKTIVO (*responde al la rido de Servet*) Kun sinjoro Villanovus mi volus fari interkonsenton.

SERVET Bonvolu!

DETEKTIVO Plej bone ridas, kiu lasta ridas. Ĉu akceptite?

SERVET Kun modifeto: plej lasta.

DETEKTIVO Pleje plej lasta. Mi volus vidi viajn librojn.

CALVIN Al spirita festeno volonte mi invitas vin.
(*Montras al la librobreto.*)

SERVET (*Dum la inkvizicia detektivo deĉifradas la titolojn.*) Cenzuritaj eldonaĵoj, ĝis la lasta.

CALVIN Pensoj trosarkitaj de doganistoj de la spirito.

SERVET La malpermesitan libraron serĉu en mia kapo. (*Ridas.*)

DETEKTIVO Vi jam malobservis nian interkonsenton. Erasmus ... Encomium moriae¹¹. Kio estas en ĝi traktata?

CALVIN La stulteco.

DETEKTIVO Kies stulteco?

CALVIN Kiu prenas ĝin sur sin.

11 Encomium moriae (*greke-latine*): Laŭdo de la malsaĝeco

DETEKTIVO Ĉu sinjoro Lucanius prenas ĝin sur sin?

CALVIN Estus malĝentile.

DETEKTIVO Kontraŭ kiu?

CALVIN Kontraŭ vi, ekzemple. (*Servet ridas.*)

DETEKTIVO Villanovus ... Pleje plej lasta ... (*Montras al si.*) Ĉu vi konas ĉi tiun Erasmus persone?

CALVIN Kompreneble.

DETEKTIVO Ni havas informojn, laŭ kiuj li estas speco de intelektulo kutime nomata "servisto de du mastroj".

CALVIN Liajn majstrojn mi ne konas, nur liajn verkojn.

DETEKTIVO Kaj kiel vi opinias pri ĉi tiu libro lia?

CALVIN Genia.

DETEKTIVO (*Foliumas alian libron.*) Kaj ĉi tiu Villon? Ĉu fakte, ke li estas rompŝtelisto?

CALVIN Eblas.

DETEKTIVO Vi estas en ŝercema humoro. Ni vidu plu. Dante ... Li estas, ĉu ne, kiu laŭ certaj asertoj ekskursis en la inferon. Ĉu estas vere, ke krom edzinon, li havis ankaŭ amatinon?

CALVIN Nuntempe ni ne renkontadas lin.

SERVET Li ne prirespondas niajn leterojn.

DETEKTIVO La amatino certe okupas lin. La libron de sinjoro Erasmus — kun via permeso — mi

prenos kun mi. Ĉu vi ne verkadas laŭ Villona maniero? Ĉu vi ne deziras ien rompeniri?

CALVIN Kun via permeso, mi deziras rompeli.

DETEKTIVO El kio, de kie?

CALVIN El la infero, antaŭ kiu vi staras kiel unu el la trikapaj cerberoj.

DETEKTIVO Do hundo. Bonŝance por vi, Lucanius, ke vi ofendas nur mian personon, ne la aferon kies modesta gardanto mi estas. Ni finu la konversacion! Mi havas ankaŭ malmolajn argumentojn ...

CALVIN *(montrante al la servisto)* Unu staras en la angulo.

DETEKTIVO Ĉu vi scias, kial mi kunportos ĉi tiun libron?

CALVIN Ĉar unue vi ĉiam serĉas armilojn.

DETEKTIVO Vi montras vin saĝa homo. Do vi devas scii, ke presita litero pli danĝeras ol kugla armilo. Ankaŭ se temas pri Dante, kun kiu ne eblas nuntempe renkontiĝi, ĉu ne, ja mortinta li estas de du jarcentoj; same se temas pri Erasmus, kiu estas vere genia ĉarlatano ĉar kun afabla mieno li fiskribas dentgrincigajn ideojn al siaj nesuspektemaj legantoj. La deĵorantaj librokontrolistoj de nia institucio bedaŭrinde forgesas, ke ne aŭtoroj, sed

legantoj pli danĝeras. Aŭtoron erarvagintan oni povas rekonduki — sur brulŝtiparon. Leganto infektita per ideoj same ne ekstermeblas. Li devas do esti ŝirmata kontraŭ tiaj aŭtoroj.

CALVIN Per bruligo de libroj. Almetante kelkfoje ankaŭ la aŭtoron.

DETEKTIVO Nur en ekstrema kazo. Se la aŭtoro havas vastan sukceson. Villanovus, ĉu vi fartas malbone?

SERVET *(Kun tremantaj manoj verŝas al si akvon.)* Bagatelo. Hemikranio ... Kelkfoje ...

DETEKTIVO Se vi ne verkas, vi ne havas kaŭzon por kapdoloro.

SERVET Ne, mi ne plu verkas. *(al Calvin)* Ĝi forpasis.

DETEKTIVO Mi havas ankoraŭ du demandojn. Ĉu vi ne konas certan sinjoron Calvin, teologon?

SERVET Ĉu Calvin? Neniam mi aŭdis pri li.

DETEKTIVO Kiel do sinjoro? Laŭte sonas lia nomo urbovaste. Kie li restadas? Lucanius! Estas skribite en viaj trajtoj ke vi konas lin. Kie li troviĝas?

CALVIN Mi esperas, ke en la graco de Dio. *(Abrupte malfermiĝas la pordo, du armitaj tribunalaj servistoj enpuŝas la Forge ligitan.)*

DETEKTIVO Ĉu la birdeto kaptiĝis?

SERVISTO II Étienne de la Forge, mi raportas humile.

DETEKTIVO (*al la ligito*) Ripetu tion!

LA FORGE Étienne de la Forge.

DETEKTIVO Ĉu vi konas ĉi tiujn sinjorojn?

LA FORGE Mi ne konas ilin. Mi konas neniun el ili.

DETEKTIVO Ĉu vi ne konas viajn proprajn luantojn?

LA FORGE La nomojn mi scias, sed mi ne konas ilin. Mi ne scias, pri kio ili okupiĝas, mi scias pri ili nenion.

DETEKTIVO (*montrante al Calvin*) Li — kiel li nomiĝas?

LA FORGE Lucanius.

DETEKTIVO Kaj tiu?

LA FORGE Villanovus. La ceteron mi ne scias.

DETEKTIVO Forkonduku lin! Rekte en la konfesigejon.

LA FORGE (*Dum oni elpuŝadas lin.*) Lasu min! Mi ne estas herezulo! Mi estas fidela adepto de Kristo, lasu min! Sinjoro Calvin, ne lasu min perdiĝi!

DETEKTIVO Retro lin! (*Oni rekondukas lin.*) Kiu estas Calvin?

LA FORGE Neniu el ili. Mi diris: Villanovus ... Lucanius ... Lucanius ... Villanovus ... Miaj luantoj ili estas ... adeptoj de Kristo ...

DETEKTIVO En ordo. Ĉu vi scias, al kiu vi prirespondos la demandon?

LA FORGE Al ĉiu mi povas diri nur la veron.

DETEKTIVO Ĉu ankaŭ al la streĉpulio? Al la fingrotordilo? Konduku lin!

LA FORGE Dio kun vi, frato Lucanius. Dio kun vi, frato Villanovus. Pardonu, se mi pekis pri io. (*Oni forkondukas lin.*)

DETEKTIVO Gardistojn antaŭ la pardon! Do kiu el vi estas Calvin?

CALVIN Ĉu vi promesas ke ... sinjoron La Forge ...

DETEKTIVO Mi promesas, li ne estos torturita.

CALVIN Calvin estas mi.

DETEKTIVO Ĉu Calvin?

CALVIN Johannes Calvinus.

DETEKTIVO Troviĝis la serĉata armilo.

SERVET Ne kredu lin! Li volas savi sian amikon. Calvin estas mi.

CALVIN Mi protestas, ke iu ajn misuzu mian nomon! Calvin ekzistas nur unu. Disponu pri mi!

DETEKTIVO Per kio vi atestas, ke vi identas vin?

SERVET Li ne povas atesti tion. Per nenio ... Mi atestos. (*Serĉadas sur la librobreto.*) Mi atestos tion per mia libro. Jen ĝi. De trinitatis erroribus. Ĉu vi scias, kion ĝi signifas?

DETEKTIVO Eraroj pri la Triunuo.

SERVET Ĝin skribis mi.

CALVIN Mikelo, lasu la komedion!

SERVET La libron skribis mi. Per ĝi mi volas renver-
si la mondon.

DETEKTIVO Kontraŭ Servet ne alvenis denunco. Tiom pli
kontraŭ Calvin.

SERVET Kontraŭ Calvin! Kontraŭ mi! Kontraŭ mia li-
bro. Ĉu vi scias, kion mi skribis en ĝi? La in-
fanbapto estas stultaĵo. La instruo pri la Tri-
unuo kaj senmakula koncipiĝo estas mis-
kompreno. Dio estas unu kaj nedividebla.

CALVIN Mi malpermesas al vi blasfemi Dion en mia
nomo, Villanovus, viajn libron kaj opiniojn
foje vi retiris. Vi mem diris: kvazaŭ infano
skribis ĝin al infanoj. Sinjoro, ne kredu lin, li
ne scias, kion li parolas.

SERVET Jes ja, mi scias, kion mi skribis. Epokfaran li-
bron. Mi renversis la instruon pri la Triunuo
kaj se ĝi ne tute renversiĝis, jam pretiĝas mia
nova, potenca libro en la presejo: Christia-
nismi restitutio¹².

CALVIN Villanovus, ĉu vi perdis la prudenton?

12 Christianismi restitutio (*latine*): Restarigo de la kristanismo

- SERVET** Fundamento de la finfine purigita eklezio. Sur la ruinoj de la papistaj eraroj. Notu al vi, estimata detektiva moŝto: komenco de nova mondkoncepto estas Christianismi restituito.
- DETEKTIVO** Denunco ne alvenis.
- CALVIN** Kaj ne alvenos. Tiu libro ne ekzistas. La menciitaj instruoj estas missonĝoj de malsanulo. Villanovus estas honesta medicina studento, ne konsideru liajn infanajn ideojn seriozaj, mi petas vin. Li havas nek adeptojn, nek malamikojn ...
- SERVET** Haviĝos! Da milionoj! Jam kreskas la infanoj kiuj ĵuros per mia nomo. Ĉu mi ne havas adeptojn? Ĉar provizore ili ne videblas. Ili devas adapti sian koloron al tiu de la medio. Kampkoloraj ili estas, sinjoro, por ŝirmi sin kiel multaj malfortaj kreitaĵoj de Dio. Portempe estas nur mi, Johano Calvin, ĉi tie kiel krisigno.
- CALVIN** Krisigno de cerbomalsano! Jen mi pruvos, kiu el ni estas Calvin. (*Prenas plumon, skribas sian nomon sur papero apude trovita.*) Bonvolu legi ĝin!
- DETEKTIVO** Johannes Calvinus. Al kio mi povas ĝin kompari?

- CALVIN** *(Prenas el la tirkesto la proteston skribitan al la reĝo.)* Al ĝi. Legu ĝin!
- DETEKTIVO** Johannes Calvinus.
- CALVIN** Komparu ilin! Finite.
- DETEKTIVO** Kaporalo! Gardistoj! Forkonduku lin!
- CALVIN** Dio benu vin, Mikelo. Neniam mi komprenos, kial vi faris tion? Mi petas vin insiste, gardu vin! *(For.)*
- DETEKTIVO** Por honori vin, mi disponigos al vi freŝe forĝitajn katenojn. Ĝis revido.
- SERVET** Ĝis la revido.

DUA BILDO

Loko: juĝejo en la malliberejo de la kronprinca palaco en Vienne, Francio. Tablo de la tribunala prezidantaro. Bildo de Sankta Maria, krucifikso, flanke benko de ĵurianoj kun la Sankta Skribo, brulanta kandelo. Veronika senpolvigas zumkantante. Venas De la Fontaine, kun necesajoj por protokolado subbrake.

DE LA FONTAINE Bonan matenon, sinjorino, estu laŭdata Kristo!

VERONIKA Por eterne, sinjoro La Fontaine.

DE LA FONTAINE Pri kio oni parolas hodiaŭ en la urbo?

VERONIKA Apenaŭ de kelkaj semajnoj ni loĝas ĉi tie, sinjoro sekretario. La arestitoj krias-veas la tutan tagon, ne eblas dormi pro ili. Ĉe iu el ili oni uzis eĉ streĉpulion.

DE LA FONTAINE Pro kio vi pensas tion?

VERONIKA Estu kiom ajn da torturiloj, mia edzo kapablas diferencigi ilin laŭ voĉo. Jen nun streĉpulio, fingrotordilo, ingvenpremilo, ardigita stango ... interese, la arestitoj reagas al ĉiu diverse.

DE LA FONTAINE Reagas. Vi komencas kleriĝi, Veronika.

VERONIKA La provoso kutimas diri: "reagas, ne reagas". Kvankam "veas", "blekas" pli proksimus al la vero, ĉu ne?

DE LA FONTAINE Vi nur ne lingvistikumu, tuj alvenos la juĝistaj moŝtoj. Kio nova ankoraŭ?

VERONIKA Ĉu lingvistikumado? Hodiaŭ matene revenis la kanoniko, kiu ne eltenis la dioplaĉan vivon sen virino, surnajligis la sutanon kaj edziĝis en Ĝenevo ĉe la reformitoj. Tie eblas. Onidire tiom, ke poste ankaŭ divorci ne eblas. Sed apud la nova edzino li sekrete konservis ankaŭ siajn malnovajn opiniojn, pro kio la ĝenevanoj repelis lin en la monaĥejon. Depone li lasis tie la edzinon.

DE LA FONTAINE Kiel depone?

VERONIKA Li konfidis ŝin al iu amiko ... Sed ne povante longe elteni tie la celibaton, ankaŭ duafoje li elglitis el la sutano. La ĝenevaj presbiteroj ĉi-foje zorge priokuladis lin kaj kiam li faris la unuan krucosignon, ili pelis lin trans la limon. Kaj nun la virino estas transe kaj la principoj ĉi tie. Kiel oni elbaraktu el tia dilemo? La principoj estas karaj. Sed se virino pli karas? Ŝajne ambaŭ ne akordiĝas. Aŭ principoj, aŭ virino. Kiel vi opinias ĉi-koncerne, sinjoro sekretario?

DE LA FONTAINE Mi ne scias kion diri.

VERONIKA Ĉu eble vin kaptis la sama dilemo?

DE LA FONTAINE La manojn movu, Veronika!

VERONIKA Mi vidis, ke la plej supera inkvizitoro alvenis en kvarĉevala kaleŝo.

DE LA FONTAINE Jes, la nova arestito estas inde honorata.

VERONIKA Al ĉefa herezulo — plej supera konfesiganto. Ĉu veras, ke lia plej bona amiko denunciis lin? (*De la Fontaine kapneas.*) Do iu bona amiko. Neniel malamiko lia. Mia edzo, fajristo en la torturejo, hejmenvenas ĉiutage kun la opinio: ne plu ekzistas amikeco. Dio donis ĝin kontraŭ la soleco, Dio forprenis ĝin. "Al kiu vi diris tion kaj ĉi tion pri la papo, la Sankta Eklezio?" "Al neniuj." Kiam oni komencas trabori al li la langon, li konfesas: "nur al la propraj amikoj". Ekzemple tiu komercisto el Liono, kies orelojn oni detranĉis, rakontis ion ŝercan pri la neleĝaj filoj de la papo, kiuj laŭ mi ne ekzistas. Aŭ ĉu tamen? Egale. Li do rakontas la aferon. Iu lia aŭskultanto — aŭ subaŭskultanto — ridis nur duonbuŝe. Kaj morgaŭ kion li faris? Denunciis lin plenuŝe. Mia edzo diras: eĉ subpreĝeje fosiĝas la ratotruoj de denunciintoj. Jen, pro kio bonvolu gardi vin!

DE LA FONTAINE Ĉu mi? Ĉu vi aŭdis ion pri mi?

VERONIKA La oreloj jam doloras pro la multa aŭdado. Sinjoro La Fontaine, kiam oni denuncos la denunciintojn?

DE LA FONTAINE Ankaŭ ilin iu supergardas.

VERONIKA Mia edzo asertas: Oni ne povas senigi je ili la mondon, nur se oni ĉesigos la denuncejon. Vi bonvolas scii: kie oni disbatas la neston de korvoj, tien ili ne reflugas. Mia edzo almenaŭ ...

DE LA FONTAINE Via edzo — almenaŭ dekjaran prizonon li kunopiniis. Ili jam venas. (*Manordonas al la virino eliri.*) Servisto!

VERONIKA Dio mia, plej alta! Mi denunciis mian edzon. (*For.*)

(Envenas tribunala servisto, haltas ĉe la pordo. Tra la malantaŭa pordo envenas Ory, Arzellier kaj De la Court. Ili okupas lokon ĉe la juĝista tablo. Ory meze.)

ORY Ni povas komenci.

DE LA FONTAINE La akuzaton!

SERVISTO La akuzaton! (*Akompanata de du provosoj enpaŝas Servet, dek jarojn pli aĝa, sed ne rompi-ta; vestita civile.*)

DE LA COURT Mikelo de Villanovus, en la tria tago de nia proceso vi certe scias kiuj vin pridemandas

antaŭ la tribunalo de la kronprinclando Vienne.

SERVET Mi scias. Via moŝto Ory, doktoro pri teologiaj sciencoj, konfesprenanto ĉe la Sankta Seĝo, religia ĉefinkvizitoro en la franca reĝlando kaj en la tuta Galio; sinjoro Ludoviko Arzellier, doktoro pri juro kaj vi, enketista moŝto De la Court — estas miaj favorkoraj pridemantantoj.

DE LA COURT Paŝu al la Sankta Skribo, postdiru! (*Servet levas jure la manon.*) Mi, Mikelo de Villanovus ĵuras per la Sankta Evangelio ...

SERVET Mi, Mikelo de Villanovus ĵuras per la Sankta Evangelio ...

DE LA COURT ... ke pri ĉio mi diros la puran veron.

SERVET ... ke pri ĉio mi diros la puran veron.

DE LA COURT Dio min tiel helpu, amen!

SERVET Dio min tiel helpu, amen!

DE LA COURT Ni finu nian hieraŭan temon! Mikelo de Villanovus, ĉu vi plu insistas havi nenian rolon en la liberigo de Lucanius, alinome Johano Calvin?

SERVET Calvin estis liberigita de la servistoj de la reĝino. Mi parolis nur en sonĝo kun la reĝino.

DE LA COURT Nur en sonĝo.

ARZELLIER Kaj en kiaj cirkonstancoj? (*malapropa rigardo de Ory*)

SERVET En cirkonstancoj de homa songo. En perfekta stato de libereco. Sola, do sen timo. Mi rigardis ŝin el sub fermitaj palpebroj por ke neniu povu blindigi min pro tio, kion mi vidas. Mi ankaŭ parolis kun ŝi, sed nur per neprononceblaj vortoj, por ke oni ne povu elŝiri al mi la langon.

DE LA COURT Ĉu vi kutimas ekzamenigi vin per kuracisto?

SERVET Mi estas kuracisto, do ĉiumomente. Sinjoro ĉefenketoisto, mi esperas, ke vi ne konsideras min cerbmalsana. Se mia respondo ŝajnas kurioza, necesus ekzameni unue la demandinton, ĝenerale la konfesigantojn de la homaro.

ARZELLIER Tio ja estas pli ol tolerebla!

ORY Ni ne limigu la malliberulon en sia libereco. Mi petas vin skribi propramane: mi parolis kun la reĝino nur en songo. (*Servet paŝas al la tablo de De la Fontaine kaj skribas. Ory transprenas la paperon.*) Dankon. Daŭrigu, sinjoroj!

- ARZELLIER** Tamen: ĉu mi povus demandi? Akuzato, rakontante pri la sonĝo, kontraŭ kiu vi parolis?
- SERVET** Plede por la sonĝo. Kiam Dio elpelis la pekintajn homojn el Edeno, konsole Li transdonis al ili figofloron. Jen ĉio, kion mi lasas al vi el la paradiza feliĉo. Vian rajton je sonĝado retireblan de neniuj. Tion Li diris.
- ARZELLIER** Nenie Li diris tion. Laŭ jeno vi havas propran Sanktan Skribon kaj Edenon kun privata enirejo.
- SERVET** Ho, nur miaj sonĝoj ... Manplato da restaĵo el la Edena ĝardeno ... Tiel mi komprenis ...
- ORY** Ni lasu la malsanecajn sonĝojn. Do kiu sciigis la reĝinon, ŝiajn hugenotajn servistojn koncerne la aferon de Calvin?
- SERVET** Iu kiu ne aresteblas.
- ORY** Ĉiuj povas esti arestitaj.
- SERVET** La renomo de Calvin mem!
- ORY** Sed ĝiaj subtenantoj, disvastigantoj kaj admirantoj jes! Ĉu poste vi renkontiĝis kun Calvin?
- SERVET** Mi ne renkontiĝis. Niaj vojoj disiĝis.
- ORY** Disiĝis. Kiel mi komprenu tion?
- SERVET** El la nekonata Lucianus elsaltis Calvin sur la podion kaj kreskis je universala nocio, la

nekonata Villanovus restis kiu mi estas: la sennoma Villanovus. Privata kuracisto de la ĉefepiskopa moŝto Palmier en Vienne. Ĉi tie mi vivas jam de dekdu jaroj sola kiel servisto de servistoj.

ORY Ĉu Calvin eble fariĝis sinjoro de la mondo?

SERVET Sinjoro de tuta Ĝenevo, predikisto de Saint Pierre¹³, prezidanto de la konsistorio, aŭtoro de biblioteko da eseoj, tradukinto kaj interpretanto de la Biblio, fondinto de universitato kaj iniciatinto de seminario, konstanta prezidanto de la magistrato, generalo de la politika stabo en la religia milito, Ministro de la Sankta Vorto, predikisto de predikistoj, plej supera kontrolisto de tipografioj kaj sekretaj servoj, amiko de princoj, konsilanto de regnestroj kaj direktanto de la propre kreita movado en Skotlando, Anglio, Nederlando, Hungario kaj Pollando ... Ĉu ĉi tiun homon mi devus liberigi?

ORY Mi vidas, vi tenas la okulojn sur li.

SERVET Oni ne povas lin preteriri. Li metis sin en la vojon de ĉiu pensema homo.

ORY Ĉu vi ne envias la gloron kaj potencon atribuitajn al li?

13 Saint Pierre: preĝejo Sankta Petro en Ĝenevo

- SERVET** Mi ne avidas potencon. Mi ne scipovus bridi eĉ hundidon.
- ORY** Kun pia admiro vi denombris la oficojn de Calvin.
- SERVET** Calvin havas sep cerbojn, mi nur unu. Jen kion mi envias al li.
- ORY** Ĉe la aresto de Calvin, kial vi volis okupi lian lokon. Kion vi celis per la dublado?
- SERVET** Mi volis nur fari ion por li.
- ORY** Se ankaŭ vi havus sep cerbojn, por kio vi utiligus ilin?
- SERVET** *(suspektante kaptilon)* Por la defendo de nia Sankta Eklezio, kompreneble.
- ORY** Vi estas multe pli simpatia se vi ne mensogas. Denombriu viajn librojn! Kreaĵojn de unu via cerbo.
- SERVET** Syroporum universa ratio ... Apologetica disceptatio pro Astrologia ... In Leonartium ...
- ORY** Bagateloj. Diru la lastan!
- SERVET** Notoj al la geografio de Ptolomaios ...
- ORY** Ni lasu la geografion kaj la siropojn! Nomu la teologion! Kion ni ne trovis ĉe la domtra-serĉo.
- SERVET** Kion vi ne trovis: ne ekzistas.

- ORY** Ĉu vi legis la Institutio de Calvin?
- SERVET** Jes.
- ARZELLIER** Kiel vi akiris ĝin.
- SERVET** Ĉe librovendisto.
- ARZELLIER** Kial vi ne anoncis tion?
- SERVET** Mi iris por aĉeti, ne denunci.
- ARZELLIER** Kaj kial vi ne anoncis la libron mem?
- SERVET** Mi ne povas ĉiutage denunci miajn legaĵojn. Ankaŭ vi legis la instruojn de Arius, Wycliffe, Johano Hus kaj Luther. Ĉu vi denunciis vin pro tio?
- ARZELLIER** Tiuj instruoj ne infektas en niaj kranioj, do ili troviĝas en bona loko.
- SERVET** Koncerne la sidejon de pensoj ne ekzistas kompetentaj kaj nekompetentaj kranioj. Dio kreis ĉiun kun malfermitaj fenestroj. Al kiu Li donis rajtigon tabulumi eĉ unu el ili? Aŭ ...
- ORY** Ni ne diskutos ĝis la Lasta Juĝo! Villanovus, ĉu vi jam aŭdis ion pri iu teologo Servet?
- SERVET** (*Glaciigas.*) Mi aŭdis.
- ORY** Vi certe konas lin.
- SERVET** Ne ... mi ne konas lin.

- ORY** Michael Servetus Villanovus. Tiel li nomiĝas. Rigardu ĉi tiun libron! Paŝu pli proksimen! Prenu ĝin! Bonvolu legi ĝian aŭtoron!
- SERVET** Michael Servetus Villanovus.
- ORY** Ankaŭ la titolon.
- SERVET** De trinitatis erroribus.
- ORY** Tio estas pri eraroj koncernantaj la Triunuon. Do vi ne konas ĝin. Tiam permesu al mi memorigi vin pri io ...
- SERVET** Superflue. Kiam Calvin estis arestita en Parizo, mi terure hontis ne povi helpi lin, do mi levis subite ĉi tiun libron de sur lia breto kaj diris al la leŭtenanto inkvizicia detektivo, ke ĝia aŭtoro estas mi, tio estas Calvin aŭ Lucanus; la vera, serĉata reformatoro ... Se estas konsiderataj mia tiama anima konfuzo, junula ambicio kaj — mi konfesas — ankaŭ envio ĉar tuta Parizo eĥas la nomon de Calvin ... mi pensas, fariĝas komprenebla mia aŭdaco, sed kiam tio okazis kaj kiu tiam kredis min? Mem Calvin atestis fine ... (*Ridas.*) Ankaŭ la leŭtenanto inkvizicia detektivo ridis pri mi ... Ĉu via ekscelenco nun prenas la aferon serioza? Tiam eble mi estus feliĉa, almenaŭ fiera, ke per tiel pia trompo mi ŝtelas iom el la renomo de mia amiko kaj liberigos min ar-

mitoj de la reĝino aŭ rabos min jam el sub la pendumilo ... Imagoj, ĉu ne ... eĉ ne venis al mi en la kapon, ke la dommastro de Calvin, la malfeliĉa sinjoro Étienne de la Forge estos bruligita post du semajnoj ... ja pripensu, sinjoroj, eĉ la dudekan jaron mi ankoraŭ ne plenumis kaj knabo aŭskultante oratoron, ĉu ne Cicero, aŭdante tamburadon, ĉu ne Julius Caesar volas vidi sin?

ORY Aŭ aŭtoro de nova, pli potenca verko, Villanovus. Tiam vi diris la jenon laŭvorte: Mi renversis la instruon pri la Triunuo kaj se ĝi ne renversiĝis tute, jam pretiĝas mia nova, potenca verko en la presejo: Christianismi restitutio.

SERVET Ĉu pretiĝis ĉi tiu potenca verko?

ORY Mi demandas: ĉu ĝi pretiĝis?

SERVET Kaj se ĝi pretiĝis, ĉu vi opinias ĝin potenca? Epokfara?

ORY Se vi soifas laŭdon, mi diras: genia.

SERVET Genia! Tiam ne ekzistas en Eŭropo pli malfeliĉa ĉefepiskopa kuracisto ol mi! Pretas la genia verko kaj mi ne povas identi kun ĝia aŭtoro. Mi ne povas deklari propra la ver-

kon, pri kiu via ekscelenco tiel favore esprimas sian opinion. Kvankam laŭ la titolo estas mi ĝia baptopatro. Tiam — replikante al Calvin — mi fakte diris ŝerce: ĉu Institutio? Legu baldaŭ la Restitutio! Al kiu ne saltus tia titolo sur la langopinton? Bedaŭrinde, la libro estas nur naskito de la imago. Ankaŭ la menciita presejo nur enstumblis al mi en la cerbon. En la imago de la tiama infano.

ORY Infano mia, bonvolu rigardi pli proksime la naskiton de via imago! (*Triumfe transdonas ekzempleron de la Restitutio.*)

SERVET (*Prenas la libron, foliumas ĝin tremante, defendas sin per la resto de siaj fortoj.*) Mirinde.

ORY Ĉu vi opinias? Ĝi ne plu estas Syroporum universa ratio. Ĝi estas jam teologio.

SERVET Ĉu ne kurioze? Ĝi pretiĝis. Kvankam ĵus mi menciis ĝin.

ORY Kie ĝi pretiĝis? En kies presejo? Surbaze de kies teksto?

SERVET En mia imago. Laŭ ordono de deviĝo. Kaj diris Laban al Jakob, kiam ĉi tiu dungigis kiel ŝafisto: kion mi donu al vi? Donu al mi nenion ...

ORY Kiuĵ estis la kompostistoj?

- SERVET** ... sed mi denove paŝtos kaj gardos viajn ŝafojn kaj kiom da mikskoloraj kaj makulitaj ŝafoj vi nur havas, ĉiuj estu la miaj. Kaj la nigraj restu al vi.
- ORY** Ĉu vi identas aŭ ne kun la aŭtoro de la libro?
- SERVET** Kun la vera aŭtoro — eĉ se verkus ĝin mi — mi ne identus.
- ORY** Plej Sankta innocentia¹⁴!
- SERVET** Kaj Jakob starigis strie senŝeligitajn avelvergojn en la trinkotrogojn, por ke se la ŝafinoj venos trinki, ili vidu tiujn, havu ilin ĉiam antaŭ la okuloj kaj koncipu mikskolorajn ŝafidojn.
- ORY** Ĉu vi volas nun reciti al ni la Genezon? Parolu pri la propra, en herezo koncipita!
- SERVET** Kaj la ŝafinoj koncipiĝis antaŭ la vergoj kaj naskis nurajn mikskolorajn ŝafidojn.
- ORY** *(Kvazaŭ jam interesus lin la parabolo.)* Evidente de la mikskoloraj virŝafoj.
- SERVET** Sed en la signo de la avelvergoj. Tio estas la leĝo de ĉiu kreado.
- ORY** Ĉu la avelvergo?

14 Innocentia (*latine*): naiveco, senkulpeco

SERVET La deviĝo starigita antaŭ niajn okulojn. Volo de Jakob en niaj akvo, pano, ĉiuj niaj intencoj.

DE LA COURT *(al Ory mirfrapite)* Li freneziĝis.

ARZELLIER Avelumiĝis. *(Lia plenvoĉa ridego infektas ankaŭ la du aliajn.)*

DE LA COURT Striita vergo en la trinkotrogo de Servet ... *(Ridegas.)*

ARZELLIER La ŝafido tamen fariĝis nigra. *(Anhelas pro la ridego.)*

ORY *(frapinte per la martelo)* Do la deviĝo. La nepreterirebla. Michael Servetus Villanovus, vi ankoraŭ ne konfesis vian aŭtorecon kaj per via parabolo jam ekpledis por via libro. Dankon por via helpo.

SERVET *(hezite)* Mi ne identas.

ORY Laŭtleĝu, mi petas vin, la enkondukon! *(Paŭzo.)* Vi povas legi ankaŭ parkere.

SERVET Mi ne povas legi sen teksto aliulan enkondukon.

ORY Legu la substrekitajn liniojn!

SERVET *(Legas.)* Ho, Jesuo Kristo, filo de Dio, vi kiu estas donita al ni el la ĉielo, manifestu vin al via servisto, por ke tiel granda revelo aŭten-

tike klariĝu antaŭ ni. Estas via afero, kies defendon — sekvante internan Dian inspiron — mi entreprenis ... Vi instruis min ne kaŝi la lumon en mi. Ve al mi, se mi ne povas prediki la veron!

ORY Subskribo?

SERVET M. S. V.

ORY Michael Servet Villanovus. Kiu staras antaŭ ni.

SERVET Mi estas nur Michael de Villanovus. Privata kuracisto de lia ĉefepiskopa moŝto Palmier kaj fidela membro de la Unusole Sava Roma Sankta Eklezio.

ORY Ĉu fidela?!

SERVET Atestas la tuta urbo. La tuta preĝeja komunumo. Ĉu mi forestis unusolan fojon — eĉ pro malsano — en la matenaj, posttagmezaj, labortagaj sanktaj mesoj? Atestas nia spirita patro en Vienne: regule mi preĝis kontraŭ tentoj, por la papo, nia episkopo, mi preĝis al niaj sanktaj patronoj, al mia gardanĝelo, mi faris konfesojn, donis almozon, vizitis kermesojn kaj akceptis kun pura koro ĉiun sanktan komunian. La akuzo min ne koncernas, sed se tamen mi eraris, mi pretas

preni sur min la plej pezan pentofaron. Mi neniam volis disidenti de la eklezio, ĉar mi kredas kaj konfesas: estas sole la Sankta Eklezio, kiu neniam kaj pri nenio eraras. Eraras nur vi asertante, ke mi verkis herezaĵon kaj ke mi identas kun Mikelo Servet. Vi havas nenian pruvon pri tio.

ORY

Ĉe verdiktado sincera kaj pentema konfeso konsideriĝas savaj cirkonstancoj. Do mi devigas montri al vi la pruvojn. Ĉu vi konas ĉi tiujn leterojn? Vi pravas en ili la veron de via libro. Per la skribmaniero de via mano. Vi skribas ekzemple: "Kara amiko, mi parolis kun la reĝino nur en songo." Adresito estas Johannes Calvinus, sendinto: Michael Servet Villanovus.

SERVET

(neniigite) Ĉu domtraserĉo estis ankaŭ en Ĝenevo? Ĉu ankaŭ Calvin arestita?

ORY

Calvin kaj liaj instruoj havas armitajn gardistojn.

SERVET

(rigardante la paketon da leteroj) Oni enrompis en lian domon. Ŝtelis la leterojn!

ORY

Ne necesis. Li mem sendis ilin al ni.

SERVET

Ĉu miajn leterojn?

- ORY** Viajn. Sub sigillo secreti¹⁵.
- SERVET** Ĉu Calvin — al la inkvizicio?
- ORY** Kun via permeso — al mia modesta persono.
- SERVET** Ne ... ne eblas.
- ORY** Ĉu ili estas viaj leteroj?
- SERVET** Miaj zorgoj dividitaj kun Calvin.
- ORY** Kaj ĉu vi miras vidi ilin ĉi tie, mortule kuŝigitajn?
- SERVET** Mi ne miras, ĉefinkvizitora moŝto. Senmerite estus de mia flanko. Mi diras nur, kion oni povas diri antaŭ la sojlo de la morto: tio ne eblas.
- ORY** Eblas. Ĉu vi scias, kial? Via amiko, kiel vi diris, havas sep cerbojn. Do leginte vian libron estis al li facile rimarki en Michael Servetus Villanovus la alian Reformatoron. La alian sepcerbulon. Ĉar vane vi aliĝis al li en la herezo, vane li atakas Romon, vane vi kuiras ambaŭ la saman kaĉon, vane vi kalumnias la kredantojn de la katolika eklezio kaj Lian Sanktecon, la papon; vane vi blekas horde, ke inter Dio kaj homo ne necesas peranto, nek necesas indulgenco, bildo, sankta akvo ke superfluas pentraĵo, relikvo; el niaj pre-

15 Sub sigillo secreti (*latine*): sub la sigelo de la sekreto

ĝejoj vane vi elĵetas oron, arĝenton, piajn donacojn, kandelojn kaj lustrojn, sanktajn flagojn, mesmantelojn, vane vi elpelas de tie la mesknabojn, kronitajn sanktulojn kaj la Beatan Virgulinon ... vane, tute vane! Ĉar se vi mem volas ĉion ĉi alimaniere praktiki, se vi predikas pli novajn instruojn ol la novaj — rifuzante la baptadon de infanoj kaj la diecon de Kristo —, se vi ne kaptas mense la absurdecon de la antaŭdestinismo de Calvin dirante, ke ĝia idea profundeco por vi tro altas, tiam notu al vi bone, Mikelo Servet, estinta Villanovus: vi estas ne malamiko de Calvin, sed pli malbona ol tio: lia opozicio!

SERVET Nenio lia mi plu estas. Mi estis lia amiko.

ORY Por ni vi estas nur malamiko. Kaj tio min plene kontentigas. Kie estis presita la libro?

SERVET En la loka tipografio de ĉefepiskopo Palmier.

ORY Dum vi manĝis la panon de la sinjoro episkopo. Eldonkvanto?

SERVET Mil.

ORY Kie ĝi estis disvastigata?

SERVET En Germanio, Nederlando, svisaj civitoj.

ORY Sur vasta fronto vi malfermis fajron kontraŭ Calvin.

- SERVET** Mi ne verkis kontraŭ li. Sed en la intereso de mia konscienco.
- ORY** La mikskoloraj avelvergoj. Kaj kiel akceptis ĝin la libertinoj en Ĝenevo?
- SERVET** Mi ne konas libertinojn.
- ORY** Ili estas malamikoj de Calvin. Vi povas bedaŭri, ke vi ne havos parton el ilia laŭdo. Kaj kiel opiniis Calvin mem pri via verko?
- SERVET** Li nur riproĉis min perletere.
- ORY** Ni bedaŭras, ke vi jam ne aŭdos lian personan opinion. Kiom da ekzempleroj vi vendis ĉi-loke?
- SERVET** Kvin.
- ORY** Kvar el la ricevantoj mi jam trovis. Mi diras ankaŭ ĝojigan informon: la kadavraj makuloj de via spirito jam eruptis ankaŭ sur ni. *(De la Fontaine ektemas.)* Kiu estas la kvina?
- SERVET** *(Ekrigardas al De la Fontaine. Tiu terurite streĉatendas lian respondon.)* La kvinan mi ne konas. Estis komercisto el Liono.
- ORY** Sinjoro ĉefsekretario, pro kio vi tiel terurigis.
- DE LA FONTAINE** Propradire ... pro la penso, ke kun ĉi tiu homo mi plurfoje promenis.
- ORY** Ni promenas kune kun nia senscio. Kelkfoje eĉ kun nia fato. Ĉu la sinjoroj ne plu havas

demandon? Ne. Akuzato, ĝis morgaŭ elcerbumu, kiu estis la liona komercisto. La kvina. Kun la aŭtoro ni jam finis. Sekvas liaj legantoj. Ankaŭ ilin ni devas savi. Ne forgesu, Servet, kie peko plimultiĝas, graco multe pli superabundas.

SERVET Epistolo el la Romanoj.

ORY Brave! Vi povas forkonduki lin. (*La gardistoj elkondukas la arestiton.*)

SERVET (*returninte sin*) Mi scias kaj estas konvinkita en Sinjoro Jesuo, ke nenio malpuras en si mem, sed ajno malpuras, por tiu kiu konsideras ĝin tia ... Feliĉa estas, kiu ne riproĉas sin pro tio, kion li aprobas.

ORY Nu finfine. Vi demetis la kaskon. Konduku lin! (*Oni elkondukas la arestiton, la juĝistoj forlasas la podion, De la Fontaine restas sur sia loko. Preterirante lin, Ory returnas sin al li.*) Apostolo Paŭlo pli koncizas en la latino: ubi abundavit delictum, superabundavit gratia¹⁶. Epistolo al la Romanoj, sed kioma parto? (*De la Fontaine ŝultrumas.*) La kvina. Ne forgesu! La kvina! Bonan apetiton! (*For.*)

16 Ubi abundavit delictum, superabundavit gratia (*latine*): Kie peko plimultiĝis, graco multe pli superabundis.

(De la Fontaine, plena de timo, longe postrigardas lin.)

VERONIKA *(Venas kun balailo, viŝtuko.)* Oni absolvis ĉi tiun malfeliĉulon, ĉu ne?

DE LA FONTAINE Ne.

VERONIKA Li ja iris tiel ... Mi vidis lin en la koridoro. Hm, kiu denunciis lin?

DE LA FONTAINE Kiu ankaŭ vian edzon.

VERONIKA Ĉu mian edzon? Ĉe kiu? Kaj kial?

DE LA FONTAINE Ĉe mi. Pro liaj rimarkoj.

VERONIKA Rimarkoj! Sankta Aŭgusto! Da rimarkoj li havas abunde.

DE LA FONTAINE Bedaŭrinde. Ĉu vi scias, kiu estas la plej grava?

VERONIKA Ve, de kie mi povus scii? Unu estas pli grasa ol la alia. Pro io li terure naŭziĝis, vi bonvolas scii: li jam multe vidis en la torturejo kaj vane mi admonas lin: Ĵeronimo, metu al vi seruron sur la buŝon, alie vi mem iros malantaŭ seruron. Ankaŭ de ĉi tie ni devos fuĝi. En ĉi tiu urbo oni venis al punkto kie oni ne povas loĝi kun sia opinio sub unu tegmento. Kio estis tiu rimarko?

DE LA FONTAINE Pri la nesto de frugilegoj. Se oni disbattas ĝin, ili ne plu reflugas. Ĉu tiel li diris?

VERONIKA Precize.

DE LA FONTAINE Oni interpretos tion kvazaŭ diritan pri la inkvizicio.

VERONIKA Pri la ĉefinkvizitora moŝto! Terure. Ĉu la sinjoro sekretario devas pludoni la denuncon?

DE LA FONTAINE La problemo kuŝas en tio, ke antaŭ la aresto de ĉi tiu ... Villanovus mi plubabilis tion al li. Al la akuzato. Hodiaŭ oni jam komencis paroli pri la ribeluloj, sed laŭ nomo ankoraŭ neniu menciigis. Morgaŭ ili eltrudos tion el li.

VERONIKA Eltrudos, mi scias. Ĵeronimo diras: Kion ili bezonas, kune kun la hepato elprenas. Kion fari?

DE LA FONTAINE Mi diros.

VERONIKA Bonvolu diri!

DE LA FONTAINE Via edzo intime amikas kun la provoso.

VERONIKA Parenkas.

DE LA FONTAINE La arestito, Villanovus, devos malaperi de ĉi tie ĝis noktomezo. Li devas fuĝi. En civila vesto.

VERONIKA Jes.

DE LA FONTAINE Kaj via edzo saviĝos.

VERONIKA Jes.

DE LA FONTAINE (*Prenas paperfolion el la poŝo.*) Kaj mi silentos. (*Li tenas la paperon super kandelon.*) Silentos ankaŭ la denunco.

VERONIKA (*rigardante la brulantan paperon*) La plej bela brulŝtiparo, kiun mi vidis en la vivo. Sinjoro ĉefsekretario, Dio benu vin per ambaŭ manoj! Ho, se nur mi vidus la denunciintojn de mia edzo tiel diseriĝi en cindron.

DE LA FONTAINE Iru!

VERONIKA Sinjoro ĉefsekretario, eĉ tra inferoj! Por Ĵeronimo, se necese, eĉ la tutan arestejon mi malplenigos. Kaj se la afero ne sukcesos, mi ekbruligos ĝin. Por Ĵeronimo mi forbruligos ĉi tiun tutan ratejon! Amen! (*For.*)

KURTENO

DUA AKTO

Konsilejo de la Ĝeneva konsistorio, ĉefstabejo de la reformacio. Du skribotabloj: unu por De la Fontaine, la alia tiu de Calvin. Flanke: ĉambro de gardistoj, laŭlonge de la muro: vicigitaj armiloj. Sur muro: mano kaj la simbolo vidita en Parizo, sed presita. Fone: fasado de la preĝejo Saint Pierre. Ambaŭflanke elirejoj. Dekstra pordo malfermiĝas al atendejo. De la Fontaine, sekretario de Calvin, agadas antaŭ la mapo: per blankaj flagetoj markas la novajn sidejojn de la reformacio. De ekstere foje-refoje aŭdiĝas hufbatado. Bruo de kurieroj ekirantaj en ĉiuj direktoj de Eŭropo. Armita gardisto gongigas signalon sur sonorilo. De la Fontaine komencas aranĝi kun hastaj movoj la paperojn sur la skribotablo de Calvin. Printempa suno.

CALVIN *(Envenas.)* Bonan matenon!

DE LA FONTAINE Bonan matenon, Majstro! Kiel servis al vi la nokta ripozo?

CALVIN Neniel. Sed ne demandu pli. Superflua tempopasigo.

DE LA FONTAINE Laŭ ordono de pastoro Farel ĉiutage mi devas interesiĝi. Tuta Ĝenevo havas zorgon pri la sanstato de la Majstro.

CALVIN Tuta Ĝenevo. Ĉu ankaŭ la libertinoj? *(Deme-*

tas la kapoton, haltas antaŭ la mapo.) Ĉu ankaŭ la panteistoj, ateistoj kaj rebaptistoj?

DE LA FONTAINE Eble ankaŭ tiuj.

CALVIN Neeble. Precipe. Ĉar ili atendas mian morton. Diru al ili, La Fontaine, ke mia vivo estas senĉesa agonio, sed por ilia pleja ĉagrenno mi ne estas mortonta. Diru al ili, ke sep diversaj malsanoj turmentas min, interalie kronika podagro, nefrita koliko, gruzmalsano, sendormeco kaj dujardeka kapdoloro; ke hodiaŭ matene mi vomis sangon, la dekan jaron mi jam ne matenmanĝas kaj sanigas min per fastoj tridekseshoraj. Diru al ili, ke ne nur mi malsanas: mian edzinon ligas lito, poste Dio prenis al si niajn infanojn. Tiras-ŝiras min la Superestulo, sed mi scias, ke tio venas el Liaj manoj kaj tio konsolas min. Kaj mi ne mortos ĝis mi ne elfumumos tiujn el la urbo. Ek al laboro! La monaĥoj preĝas, babiladas, drinkas kiel funelo kaj postkuradas virinojn, ni — laboru iom! Ĉu la kurieroj ekvojis?

DE LA FONTAINE En ĉiujn direktojn.

CALVIN La predikistoj?

DE LA FONTAINE Ĉiuj.

CALVIN *(antaŭ la mapo)* Prago?

DE LA FONTAINE La ĉeĥoj postulas rean informon en la afero de la antaŭdestino.

CALVIN Sendu al ili ekzempleron de la Instituto. Varsovio?

DE LA FONTAINE La pola reĝo petas, ke la Majstro donu indan respondon al Stancarus koncerne la aferon de la Triunuo.

CALVIN Ricevota.

DE LA FONTAINE Li skribas, ke ankaŭ en Varsovio ekaperis rifuzantoj de la Triunuo. Ĉu skribe aŭ per veneno okazu la respondo?

CALVIN Ŝnure.

DE LA FONTAINE Nia episkopo en Londono petas novan pastoron.

CALVIN Tie ja estas Gessner.

DE LA FONTAINE Bruligita.

CALVIN Iru Galesius. Burgius revenu el Loreno!

DE LA FONTAINE Murdita.

CALVIN Iru Gyronus. Parizo?

DE LA FONTAINE La franca reĝo Henriko III-a ...

CALVIN Kion volas denove ĉi tiu babilona malĉastulo.

DE LA FONTAINE ... sciigas, ke ni revoku niajn homojn el Parizo, alie li estos devigita bruligi ilin. Ili ĝenas lin en la regado.

CALVIN Skribu al li, ke ili ĝenas neniun. Ili anoncas la evangelion de la paco. Kaj li liberigu la lionajn studentojn. Cetere mi tekstigos tion.

DE LA FONTAINE Ili estas kondamnitaj al ŝtiparumo. Petas konsolon de la Majstro.

CALVIN Kvin el niaj karaj filoj. Mi skribos novan leteron al tiu babilona pariĝema bruto. Nederlando?

DE LA FONTAINE Nenia nova informo. Alciati kaj Blandrata venenas en Transilvanio.

CALVIN Se traserĉinte la teologiajn diskutojn pune oni nur dentojn eltiras al la malvenkintoj, kompreneblas, ke Castellio venenas.

DE LA FONTAINE Li redaktas pamfletojn kontraŭ Calvin. Kiel Gentylis en Liono.

CALVIN Ili ricevos indan respondon. Notu ĝin!

DE LA FONTAINE Superflue. Rebatojn la Majstro ne forgesas.

CALVIN Kion faras la bernanoj?

DE LA FONTAINE En la intereso de la unueco ili denove petas decidi: ĉu fermentintan aŭ senfermentan panon doni ĉe komunio. Kaj la celibato ...

CALVIN Ĉu ili ne havas aferon pli gravan? Skribu al ili: se enestas fermento, bone, se ne, same ne

malbone. Pri la esenco ili zorgu, alie la papistoj disbatos ilin. La libertinismon ili neniiĝu kaj la rifuzantojn de la Triunuo kaj ne fermentumu. Skribu ankaŭ al Bazelo kaj Zuriko — ho, molkora Melanchton! — bridon sur la internan malamikon! Kaj se ili kapablas, pensu en pli vastaj dimensioj. Ni planis la reformacion por la tuta mondo; kaj ne pro senfermenta pano kaj fermentinta kukumo, sed por ke ni konduku ĉiun genton al la pura evangelio. Kiom ni malproksimas de tio, ke ĉiu gento legu la Vorton de Dio en la propra lingvo, ne nur en tiu de Sankta Hieronimo. Triono, se ne duono de la hispana, germana kaj angla teroj plurestas katolika eklezia bieno, kaj cuius regio, eius religio¹⁷, — pramoda sistemo de feŭdoj strangoladas nian aferon, milionoj da servutuloj estas analfabetaj, trudiĝas akcepti la papistajn perantojn; anstataŭ honesta burĝa jurisdikcio ĉiu ebria feŭdulo havas glavjuran rajton kaj niaj bernaj kunfratoj remaĉadas pri la celibato.

DE LA FONTAINE Novan starpunkton ...

CALVIN Episkopo de la Baume kontraŭorganizas ĉe la limoj de Ĝenevo. Ili sendu armilojn, ne

17 Cuius regio, eius religio (*latine*): Kies regio, ties religio.

skolastikajn demandojn. Sinjoro profesoro Gerson havis tempon deserti, ĉu dumdorma polucio de fava bokmonaĥo estas peko aŭ ne ... Ni ne havas tempon por tiaĵoj. Skribu, mi ne apartenas al tiuj, kiuj atakas Romon ekskluzive pro privirinaj aferoj kiel Trojon tiuj malsaĝaj grekoj. Cetero?

DE LA FONTAINE Sinjoro Mikelo Servet venis duafoje renkonti vin.

CALVIN Li ne venu.

DE LA FONTAINE La ekzemplerojn de lia libro troveblajn en la urbo mi kolektigis, bedaŭrinde la pliparton kaŝis la libertinoj. Evidente pro la tridek leteroj, kiujn li skribis kontraŭ la Majstro.

CALVIN Li ne venu.

DE LA FONTAINE Farel ordonis domtraserĉojn.

CALVIN Li ne venu!

DE LA FONTAINE Li venos. Li estas iom impertinenta kaj apelacias al via junaĝa amikeco.

CALVIN Li jam delonge rompis ĝin per sia herezo.

DE LA FONTAINE Mi elĵetos lin.

CALVIN Ne elĵetu lin! Milde petu lin: li ne volu renkonti min. Insiste mi petas lin: iru for kun Dia beno. Kvankam mi diris, ke viva li ne

forlasos Ĝenevon, se li aŭdacos veni ĉi tien, sed Dio punu lin ... Dio plibonigu lin ... se Li povas ... Mi lasos lin eliri en paco tra la urba pordego.

DE LA FONTAINE Ĉu mi povas komuniki tion al li?

CALVIN Li ne venu!

DE LA FONTAINE Sed kiel Dio plibonigu lin ...

CALVIN *(Skuas la kapon.)* Cetere, kial vi insistaĉas, La Fontaine? Eble mi devus rekonduki lin al prudento. Nian senpovon ni ne transformu en farendon de Dio. Diru al li, ke mi petas lin senŝuldigi min, sed nun mi ne povas akcepti lin. Ankaŭ morgaŭ ne ... Mi estas laca, ankaŭ malsana ... Mi sciigos lin. En iu silenta loko ni iam interparolados ... *(atake)* Mi displitos lian libron per mia kritiko! *(denove milde)* Se mi nur povus ŝpari al mi sufiĉan paciencon. *(mediteme)* Necesus guto da juneco por tio ... Kaj iu studenthejmo ... *(rigide)* Sed nun li ne venu!

DE LA FONTAINE Do li forlasu la urbon.

CALVIN ... Kiel dirite! *(honta pro sia embaraso)* Kaj kiomfoje mi diru? Kaj de kie fluas via vortabundo?

DE LA FONTAINE Eble mi dormis malbone, Majstro.

- CALVIN** Vi ne dormu malbone! Tio estas mia tasko. Alvoku Farel! Sendu la kuraciston al mia edzino. Mi petas la kopion de la ordonnance¹⁸-oj. *(De la Fontaine transdonas la skribaĵojn kaj foriras. Calvin paŝas tien-reen.)*
- SERVET** *(envenas kun sako surdorse kiel trampo; longe ili rigardas unu la alian.)* Kun la reĝino mi renkontiĝis nur en sonĝo. Ke Dio preferus, ke ankaŭ kun Johano Calvin mi estus korespondinta en sonĝo. En la perfekta stato de libereco kaj sekureco. Por ke li ne pasigu miajn leterojn en la manojn de la inkvizicio. Mikelo Servet, la iama Villanovus volis nur tiom diri al la Kapo de la reformacio, la iama Lucanius. *(Hezite li preparas sin eliri.)* Mi aŭdacis iniciati debaton kun vi, sed mi ĵetis al vi nur panon. Se vi reĵetus al mi nur koton aŭ fulmotondron. Ne denuncon.
- CALVIN** Faris ĝin mi, ĉu tiel vi pensas?
- SERVET** Propraokule mi vidis miajn pensojn dividi-tajn kun vi ... sur la tablo de Ory.
- CALVIN** Viajn atakojn kontraŭ la dieco de Kristo, saviĝo per kredo, antaŭdestino kaj baptado.

18 ordonnance (*france*): regularo, dispono, ordono; eklezia regularo de Ĝenevo

Ĉio kio estis dubo, Mikelo, degeneris en vi en hurlon.

SERVET Mi havas ardeman temperamenton kaj estas persekutato de la inkvizicio, sed ne ĝia aliancano!

CALVIN La leterojn pasigis Farel — sen mia scio.

SERVET Ĉu vi ĵuros je la sano de viaj infanoj?

CALVIN Ili mortis.

SERVET Je tiu de via edzino?

CALVIN Ŝi estas mortkondamnita de malsano.

SERVET Do je Dio, kiu ne estas mortinta kaj kondamnita al morto.

CALVIN Kaj ne havas tempon por niaj razonadoj. Ĉu mi voku Lin por atestado, kiam mi devas repetegi de li la vivon de mia edzino? Kiam ankaŭ per tio, plorante surgenue per ribelemaj larmoj mi enmiksiĝas en Liajn intencojn? Ĉu vi alvokas la Sinjoron ke Li anstataŭu miajn vortojn? Atentu, Mikelo! Mi neniigos vin aŭ vi frakosas min aŭ frakasiĝos sur mi, sed eĉ tiam mi ne mensogos al vi.

SERVET (*feliĉe*) Lucanius! Mi aŭdas vian malnovan voĉon! Ne koleru, ke mi dubis pri viaj vortoj. Mi venis por tio, de ĉi tiu dubo mi devis liberiĝi.

- CALVIN** Kaj kio okazos kun la aliaj?
- SERVET** Mi ne scias. Permesu brakumi vin! (*Brakumas lin.*) Pardonu mian vagulan vestaĵon! Eble ĝi ankaŭ malpuras. Donaco de la provoso. Mi povis nur tiamaniere saviĝi el la ungegoj de la inkviziciaj detektivoj, samkiel vi en masko de vitejgardisto kun dorskuvo. La kvaran monaton mi kaŝvagadas tra Eŭropo, naskolando de la humanismo.
- CALVIN** Vi ne devus veni ĉi tien.
- SERVET** Ĉu mi iru al Romo? Al miaj malamikoj? (*serĉante en sia sako*) Persone mi volis transdoni al vi mian plej novan libron. Mian laboreton al la fama verkinto de la Institutio. Akceptu ĝin kun favoro. Jen la Restitutio.
- CALVIN** Formetu ĝin! Ĝi indas je fajro.
- SERVET** Ĉu la libro? La verko?
- CALVIN** La eraro.
- SERVET** Ĉu penso kontraŭa al la via aŭ diferenca en kelkaj rilatoj — estas erara?
- CALVIN** Hereza.
- SERVET** Sed ankaŭ vi ja estas herezulo. Ekskomunikita de la papo: vi ne rajtas tiel paroli nur ĉar vi venkis. Kaj armitaj servistoj defendas viajn instruojn.

CALVIN

Estas devo por mi tiel paroli, ankaŭ pro via nescio. Mi ne venkis. La libertinoj povas transpasigi Ĝenevon en ajna horo al Francio. Kaj tiam malriĉiĝos ĉi tiu urbo ne je via libro, sed je kelkmilo da homaj vivoj. (*Pafoj.*) Ĉu vi aŭdas? Ne por mia honoro, sed kontraŭ mi oni pafas, Mikelo Servet. Formetu ĉi tiun libron kaj iru de ĉi tie kun paco! Vi venis en malĝustan lokon, tio ĉi ne estas Arkadio, ne promenejo de grekaj filozofoj; kiel senscia infano vi ireraris sur batakampon. Mi ne petas, ke stariĝu apud nin: dekdu jarojn mi jam diskutas kun vi sen rezulto, mi ankaŭ ne deziras, ke demetu la armilon kaj levu niajn. Vin povas savi nur la fina graco el la peko de la rifuzo de la Triunuo. Foriĝu de ĉi tie, kien ankaŭ mi pro trudo kaj kun hororo venis, sub pezo de la malbenoj de Farel, ĉar bone mi scias: mi deziras solecon, sciencajn laboradon kaj abomenas luktojn, sed konduki Ĝenevon antaŭ la Sinjoron alimaniere ne eblas. Se Dio derompis kaj kondukis min ĉi tien tiam mi estos nerompebla, ĉar de Li mi ricevis, kion mi instruas kaj tio fortigas mian konsciencon.

SERVET

Kaj se ankaŭ mi de Li ricevis la instruon?

CALVIN Tiam li neniigos mian jardekan laboron kaj retroefike ankaŭ tiun de Luther kaj starigos vin en mian lokon. Por ke vi reformu la reformon. Kies komencon apenaŭ ni fundamentis. Tiam Li pruvos — eble pere de vi — ke miaj ĝisnunaj deksep libroj, duonmil predikoj kaj dudekvoluma korespondaĵo estas eraro. Li reprenos de mi ankaŭ la gracon, surbaze de kiu estas mia devo apartigi bonon disde malbono, validigi la ordonojn de la Skribo, detruu la regnon de Satano — eĉ se al vi ne plaĉas ĉi tiu esprimo —, admoni kaj instrui la obeemajn, akuzi kaj neniigi la spitemajn. La Sinjoro sendis min ne por esti surkolona sanktulo, sed por ligi kaj malligi. Agi. Eĉ kontraŭ vi, se necesas.

SERVET Mi ne estas via malamiko.

CALVIN Laŭ intenco.

SERVET Ĉu ne sufiĉas?

CALVIN Bonintenca kandelo — en infana mano. Forlasu vian bonan intencon! Ĝi pruvigis malbona. Kien vi propradire celas?

SERVET Mi mem ne scias. Al vi mi venis. De ĉi tie mi volus iri al Zuriko kaj Napolo. Iu amiko mia predikas tie.

- CALVIN** Alia kontraŭ-triunuano.
- SERVET** Da ili ankaŭ ĉi tie sufiĉe troviĝas.
- CALVIN** Dio ne permesu, ke ili estus vin vokintaj.
- SERVET** Mi ne havis scion pri ili. Mi ĵuras.
- CALVIN** Facile vi ĵuras. Kaj somnambule vi vagadas tra Eŭropo. Ankoraŭfoje mi demandas: Ĉu vi scias, kien vi venis? Ĉi tiu urbo plenas de libertinoj, skismuloj. Pro via libro vi similiĝis al ili. Vi devas for de ĉi tie. Sed atendu, tiel vi ne povas iri. Vagantojn suspektindajn oni retenas ĉe la ĉefpordego. Aĉetu al vi vestaĵon konvenan al honestulo! Vi ne havas monon. La tajloro ĉe la angulo ... *(Skribas sur slipo.)* Mendu, kion vi volas!
- SERVET** Mi ne volas organizi partion kontraŭ vi en la urbo.
- CALVIN** Ekde Gutenberg plumbosoldatoj faras ĉi tiun laboron. Antaŭ ol foriri, kolektu la venditajn ekzemplerojn de via libro. Mi ne devigu ordoni traserĉojn. Ne lasu anstataŭ vin viaj librojn ...
- SERVET** Ĉu vi ne volas min apudmeti al ili sur la brulŝtiparon ... *(Ridas.)*
- CALVIN** Jes. Ĝenevo povas havi unusolan libron: la Sanktan Skribon.

- SERVET** Kaj unusolan demokration: la bibliokration. Plus viajn librojn.
- CALVIN** Ili ne rifuzas la diecon de Jesuo.
- SERVET** Diru, ĉu vi vizitas drinkejojn?
- CALVIN** Mi venis ĉi tien ne por ebrii, sed fari ordon.
- SERVET** Antaŭ mia foriro permesu al mi raporti pri kio mi sciiĝis en la drinkejoj.
- CALVIN** Tio ne interesas min.
- SERVET** Oni preparas komploton kontraŭ vi.
- CALVIN** Mi scias. Foje oni jam ekzilis min. Poste revokis min la samaj, kiuj antaŭe volis pereigi min.
- SERVET** Ĉi tiu estas alispeca komploto. *(reage al pafo)* Pli mallauĝta ol pafo. En silento kun insisto iu kontraŭagas vin.
- CALVIN** Mi aŭskultas vin.
- SERVET** Vi reguligis la novajn formojn de la komunuma vivo per katekismo en dudekunu artikoloj. Evidente, la kredantoj devas akcepti ilin. Kiuj kontraŭstaras, estas malliberigataj. Kaj ĉar unu trudo naskas alian: antaŭ la ekleziaj komisiitoj ĉiuj pordoj devas esti tagnokte apertaj. La pordoj de servista humilo. En via urbo, en la Nova Jerusalemo, plej oftas la vorto: malpermesita. Malpermesita

estas okulfrapa vesto, silko kaj veluro sur junulinoj, malpermesita estas blanka vino, ĉar pli fortas ol ruĝa; malpermesite estas petoli al gejunuloj en malpermesita loko kaj elekti por novnaskito nomon ne troveblan en la Biblio. Malpermesitaj estas senharaj mentono kaj vangoj, do kiu havas konvenajn harojn kaj saĝon, portas Calvin-barbon. Malpermesite estas lui ĉambron en gastejo sen kontroligi la pakajon, transigi ien ajn leteron sen via scio kaj tambure estis diskonigite: malpermesite estas paroli kaj opinii pri ekleziaj aferoj krom en magistrataj kunsidoj.

CALVIN

Plu!

SERVET

Kaj via plej ofta vorto estas: devo. Ĉiu devas atenti, ĉu la preskriboj estas observataj. Ĉiu devas denunci ĉiun se oni pensas, ke ... plu ĝuste oni ne bezonas pensi; malgraŭ konvinko oni devas pensi, ke ...

CALVIN

Daŭrigu, daŭrigu! Viaj kaŝitaj ungoj komencas elmontriĝi.

SERVET

Eĉ pro tio. Pro la nura malkaŝo de faktoj. Ĉar se iu ne pensas, ke li devas denunci sian homfraton, li agas kontraŭ la konsistorio. Ĉar ne nur bonaj aŭ malbonaj pensoj: eĉ sento travibranta vizaĝon konsideriĝas ago.

Dum baptado civitano ridetis en la preĝejo: tritaga enfermo pro prirideto de la konsistorio. Iu alia dormiĝis dum predikado: vekiĝis en karceru. Iu laŭdis la Biblio-tradukon de via ekzilita kontraŭulo Castello: li estas ekzilita. Iu nomis vin hipokrita: oni ekzekutis lin. Certa komercisto Ameau aŭdacis diri, ke sen via permeso eĉ terni oni ne rajtas en la konsilio: genuante en pentoĉemizo sur la ĉefplaco li devis peti pardonon pro sia opinio. Se ekzistas Dio, li pagu al mi la vinon, diris ebria veturigisto estante sola en neceso: sesmonata enfermo en turo. Tri sensciaj infanoj nedece ludis sur riverbordo — verdikto: morto per ŝtiparumo kvankam poste absolvitaj kaj nur por timigo starigitaj antaŭ fajron. Pamfleto aperis en la savoja dialekto pri Calvin — Gruet Jacques: senkapigita. Pruvo: en Ĝenevo li sola parolis ĉi tiun dialekton. Sume: pro diversaj peketoj dum duonjardeko sepdekses ekziloj, dektri pendumoj, dek senkapigoj kaj tridekkvin ŝtiparumoj estis la asignitaj respondoj de la potenco en la Nova Jerusalemo.

CALVIN

Oni kalkulas bone en drinkejoj.

SERVET

Kiu donis ĉi tiujn respondojn, en kies nomo?

- CALVIN** La neceso — en la nomo de la reformacio. Ĉar ni devas defendi nin.
- SERVET** Ĉu kontraŭ infanoj?
- CALVIN** Kontraŭ armitaj ribelantoj.
- SERVET** Ĉu kontraŭ civitanoj ridetantaj dum bapto?
- CALVIN** En la drinkejoj vi kalkulis la troigojn de Farel. Viaj ebriaj amikoj vidas nur ĝis la nazo aŭ ĝis la glasofundo. La pliparto de la punitoj estas senvirtaj libertinoj. Pro ili mi devas flari en la preĝejo odoraĉon de alkoholo anstataŭ incenso. Malĉastaj porkoj grasiĝantaj ĉe trogo; ili venas aŭskulti la predikon nur por minaci min bastone kaj pretekste de fermentinta aŭ nefermentinta pano sufoki la predikadon de la evangelio en skandalon kaj inciti interbatadon. Sed tio ne gravas. (*Mont-ras al la mapo.*) Flagoj de triumfo, vi pensas, ĉu? Tomboŝtonoj de predikistoj de la reformacio ili estas, dise tra Eŭropo. Ĉu mi devas atentigi vin pri la inkvizicio? Ĉu dektri pendumitaj libertinoj en la ribelanta Ĝenevo terurigas vin? Dektri mil martiroj niaj en Hispanio, Anglio kaj Italio — ĉu bagatelo? Cent mil luteranaj kampuloj masakritaj en Germanio — ĉu negravaĵo?

- SERVET** Ili estis ribelantoj, ne ternintoj kontraŭ sia estro en la konsilio.
- CALVIN** Ribelantoj. Ĉu ne la reformacio donis armilon en iliajn manojn? Ĉu ne la reformacio deklaris, ke la povo de ĉiu ajn reganto kaj potenculo devas esti rompita, se ili forlasas la vojon de la justeco?
- SERVET** Aŭ se ili nedece ludas sur riverbordo.
- CALVIN** Ne serĉu tuberon sur junko! Cetere tiuj estis bordelaj fivirinoj. Diablinoj. Ili envultas eĉ anĝelon. Mi diras la kernon de la afero. Milito iras kontraŭ ni. Komenciĝas religia milito, Dio scias, kian finon ĝi havos. Sed kiel ajn estu, Mikelo Servet: Ĝenevo ne estos rompita — nur kune kun niaj ostoj. Se revenos ĉi tien aŭ papistoj aŭ libertinoj, perdiĝos Zuriko, Bazelo kaj Ŝafhaŭzeno kaj ni povos rekomenci la batalon ekde eko en Vitenbergo. Se en ĉi tiu urbo ne establiĝos dioplaĉa vivo kaj humileco ...
- SERVET** ... kaj brido sur-opinia, leterkaptado kaj deviga uniformo en la kredo, ĝis la lasta butono ...
- CALVIN** Ĝis la lasta butono, kiel vi volas! Ĉar interduboj kaj ideaj diboĉoj oni ne povas ne nur preĝi, sed ankaŭ: labori.

- SERVET** Ideaj diboĉoj! Mi insistis kun granda obstino pri la superstiĉoj de la papismo. Ĉu ne la juna Calvin diris tion al sia iama kunstudento Servet? Ĉu ne predikis ankaŭ vi laŭ la malnovaj instruoj? Ĉu vi bruligis vin mem pro tio?
- CALVIN** Jes. Mi amasigis brulŝtiparon en mi al la erarvaginta junulo. Kiu reviviĝas en vi ĉe ĉiu vojturniĝo. Ni ĉiuj venas el rubo kaj senscio, sed dubi pri foje trovita vero ne plu havas pravigon, alie ni prediĝos al Satano.
- SERVET** Aŭ al pendumilo.
- CALVIN** Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin.
- SERVET** Jesuo diris tion — ne en via nomo.
- CALVIN** Sed mi diras tion en Lia nomo. Kies diecon vi pridubas.
- SERVET** Nur alimaniere mi klarigas ĝin. Vian instruon pri la Triunuo vi kun Luther transprenis de Romo.
- CALVIN** Mi ne havas instruojn. Mi estas nur piedtabureto por la evangelio.
- SERVET** Najloplena tabureto.
- CALVIN** Ĉar mi estas krucoportanta kaj persekutata eklezio.
- SERVET** Kaj persekutata, vi mem fariĝas persekutan-

to. En la nomo de la libera esplorado vi forĝas el kredo altruditan kredon, el kredanto pseŭdokredanton. Traserĉoj en la koroj kaj kranioj plimultigas nur pseŭdokredantojn.

CALVIN Kondiĉe, sed ne koncede: estu prefere altrudita kredo ol miskredo.

SERVET Ĉu vi estas konvinkita, ke la homaro kiel fosilia reptilio glaciiginta en via pri-Jesua komentario ekvidos la tagon de la resurekto? Ĉu vi konsideras vin la lasta pensulo, kiu ankoraŭ rajtas modifi siajn opiniojn? Ĉu Dio kreis nin laŭ sia bildo, por ke ni vole kaj dole demencu?

CALVIN Ĉiu novigo havas siajn limojn.

SERVET Ĝis ĉi tie kaj ne plu, ĉu? Vanus kaj ne eblus ordoni al iu ajn aŭ trudi iun ajn, ke liaj kredo kaj pensmaniero estu tiaj aŭ aliaj. Kiel aŭdacas la vanteco ĵeti bridon sur tiel intiman aferon de la animo kiel la konvinko? Tia devigo naskas nur mensogon kaj hipokriton. Miaj pensoj, Johano, estas eksterdogmaj.

CALVIN Diris Luther. Ho, Marteno Luther, leviĝu el via tombo, aŭskultu viajn proprajn vortojn elturnitajn el ilia originala senco kaj redirektitajn kontraŭ vi. La libereco de la evangelio jen kiel degeneras en misliberecon de la

anabaptistoj, panteistoj, ateistoj kaj rebaptistoj, sendoganan importaĵon de la spirita afta epidemio, religia pesto kaj francaj veneraj malsanoj! Ja: ĉu ekzistas pli malĉasta virino ol la Vorto donanta sin al ajna anarkiisto?! Ĉu indas ĵeti perlojn antaŭ la porkojn? Ĉu eblas prononci unusolan konjunkcion, sen ke iu viaspeca falsas ĝin?

SERVET

Aŭ kripligas mem kiu prononcis ĝin!

(Venas Farel kvazaŭ kolera arkanĝelo. Multe pli aĝas ol Calvin. Tanita, mornvizaĝa maljunulo.)

CALVIN

Kio okazis, Farel?

FAREL

Ni subpremis dumil ribelojn. Prepariĝas la dumil unua. Ni starigu la pendumilojn. Alie ni ne dissaltigos la libertinojn. La Perrin'anoj koruptas la urbon je luponesto. Ili pafadas antaŭ via domo, blekas kontraŭ la katekismo, rifuzas ĵuri kaj ribeligis la Rue-des-Allemands'anojn. Filo mia, Johano, ni starigu la pendumilojn.

CALVIN

Ni ankoraŭ atendu, sinjoro kanceliero.

FAREL

Ili ekmarŝis ĉi tien. Mi starigos gardon antaŭ la dompordon.

CALVIN

Ni lasu ilin veni.

- FAREL** Vi ne estas Jesuo, ne infanojn vi invitas al vi. Laŭ la poliestro ili ricevis subtenon. Servet troviĝas en urbo. Oni senkaŝe svingaĉas alian libron: "Malpruvu ĝin Calvin, se li kapablas!" La pliparto de la Granda Konsilio, sub la gvido de Perrin partianas al Servet. Ni starigu ...
- CALVIN** Ni ne starigos. (*Montras al Servet.*) Doktoro Servet.
- SERVET** Mi dankas vin, sinjoro kanceliero, ke vi pledis por mi ĉe la inkvizicio. La ĉefinkvizitora moŝto Ory sciigas vin, ke vi forgesis aldoni brullignon al via denunco. Pro lignomanko mia puno estas prokrastita.
- FAREL** (*mirfrapita*) Tiel grandan herezulon mi ankoraŭ ne vidis en viva pezo. Johano, kion konsilas apostolo Paŭlo en tia kazo? Turnu la dorson al Satano kaj foriru!
- CALVIN** Ne foriru!
- SERVET** Plue, sinjoro artisto Dürer dankas dece, ke vi bonvolis frakasi ĝispulvoro liajn triptikojn.
- CALVIN** La statuo de Michelangelo en Bolonjo estis frakasita kaj fandita en kuglojn dum militiro de la papo. Por ŝtopi sataj kanonojn.

- FAREL** La episkopo de la Baume per ili pafos al ni. *(Reage al ekstera bruo, krioj.)* Se restos, al kiu. Ĉar jen la ribelo. Vane mi diris, ke ni starigu gardon. Mi sciigos la policestron.
- CALVIN** Neniun! Doktoro Servet eble pensos, ke la evangelio nenian forton plu havas. *(Voĉoj ĉe la enirejo: "Enlasu min, hundo! Ni volas paroli kun Calvin. Mi piedtraktos al vi la lumbon! Ni estas ĝenevaj pracivitanoj, ne alvagingintaj francoj!")*
- FAREL** Kiel hundon mi mortpafos ilin. *(Elkaptas fusilon el la rako.)*
- CALVIN** Demetu la armilon! Demetu ĝin! *(Perrin kaj liaj kamaradoj, armitaj viroj, virinoj tumultas en la ejon. Ili estas ordeme vestitaj civitanoj.)*
- PERRIN** Monsieur¹⁹ Calvin! Ĉi tiun domon konstruis niaj patroj, ne francaj emigrintoj. Ni rajtas eniri, ĉu?
- CALVIN** Venu! Se vi jam enrompis.
- FAREL** *(Denove levas la fusilon.)* Ununura movo kontraŭ la Majstro kaj mi pafos.
- CALVIN** Ne pafu! Skribu! Protokolu la plendon de sinjoro Perrin.

¹⁹ Monsieur (*france*): Sinjoro!

- FAREL** *(Kontraŭvole altabliĝas.)* Per pendumilo oni devus protokoli.
- CALVIN** Parolu!
- PERRIN** Bone, ke ankaŭ doktoro Servet ĉeestas. Li estu orelatestanto de nia mizero.
- CALVIN** Vi konas unu la alian. El drinkejo!
- PERRIN** El la preĝejo. El kiu vi volas definitive formalpermesi nin.
- CALVIN** Nur de la tablo de la Sinjoro. Dum vi ne ĵuros je la katekismo.
- PERRIN** Vi dekumas nin kiel buĉindajn ŝafojn.
- CALVIN** Ni tro multas.
- PERRIN** Kaj malmultiĝos — en la frateco de la kredo. Ni deziris la reformacion ne por fali el site-lo en barelon.
- CALVIN** Forĵetu do la vinbarelon!
- CIVITANO I** Baldaŭ eĉ ion por forĵeti ni ne havos. Vi malpermesis al ni la komunio. Sed kiu rajtigis vin forpreni mian rajton por komerci kaj aĉeti? Ĉu vi volas, ke ne nur anime, sed ankaŭ korpe ni mortu pro malsato?
- FAREL** Sen komunio vi ne aĉetos, nek komercos!
- CALVIN** *(Geste silentigas Farel.)* Finfine kion riproĉindan vi havas kontraŭ la katekismo?

- PERRIN** Ke vi ne inokulas ĝin al ni en la animon, sed ĵetas ĝin al nia kapo! Ni volas esti adeptoj de la nova religio, ne ĝiaj solduloj. Ni konsentas: gvidu nin al Dio sen la perado de la papo! Gvidu, sed ne pelu nin per bastono, per viaj absurdaj ordonance'oj! Ni ne volas esti fanatikuloj.
- CALVIN** Por tio vi venis ĉi tien kun armiloj. Kaj fanatika rankoro.
- PERRIN** Viaj ordonnance'oj estas kruelaj reguloj. Ni defendas nian rajton pri mildeco — eĉ per armiloj se necesas.
- CALVIN** Por pleja ĝojo de la fanatikuloj de la inkvizicio.
- VIRINO I** Vi senĉese ho-ve-umas pri la inkvizicio. Ne drinku, ne dancu, ne pucigu vin ĉar Ignaco de Loyola staras jam antaŭ la pordegoj. Loyola troviĝas en Hispanio kaj oni enkarcerigas nin pro velura subjupo.
- FAREL** La veron diru, ne mensogu!
- VIRINO I** Mi malĉastis ĉe kandellumo.
- FAREL** Kaj ne la unuan fojon.
- VIRINO I** Mi esperas, ke ne la lastan. La bofratino de la Majstro faras tion ĉe taglumo ...
- FAREL** Ŝi ne plu faras!

- VIRINO I** Kaj eĉ ne kun sia edzo.
- FAREL** Ŝi puriĝas per sesmonata enfermo en turo.
- VIRINO I** Malmulte por ŝi.
- FAREL** Vi ricevos pli. Ankaŭ por via lango.
- VERONIKA** Oni devus trabori al ŝi la langon, ĉu ne, kiel tiun de la malfeliĉa presisto!
- FAREL** Edzino fajristo, silentu! Vi manĝas la panon de la eklezia konsilio.
- VERONIKA** Mi ne plu manĝas, ĉar vi elĵetis mian edzon el la torturejo. Li aŭdacis diri nur tiom — dum oni ardigis la najlon por la presisto — ke estas nehumane trakti lin tiel. Estas kru- ele kiel oni traktas la arestitojn. Ne eblas dormi pro iliaj vekrioj, kelkajn necesas ligi, por ke ili ne povu mortigi sin. Oni elĵetis mian edzon, kvankam mem la sinjoron dok- toron (*montras al Servet*) li savis el la mallibe- rejo de la papistoj. Ĉu tiel ni estas dankitaj por niaj servoj faritaj por la reformacio?
- FAREL** Gardu vin por ne ricevi punon proe.
- VERONIKA** Do pravas sinjoro Perrin ...
- FAREL** Sinjoro Perrin ne pravas! Ni repuŝos vin tien, de kie vi venis.
- VERONIKA** Jam egale por ni. Ni fuĝis de pluvo en ku- von.

- CIVITANO I** Komuniu al ni la Eŭkaristion! (*Aprobo.*)
- VIRINO II** El senfermenta pano komuniu ĝin! (*Aprobo: "Kiel ĉe la bernanoj!"*)
- FAREL** Al kiuj majstro Calvin malpermesis komunii la Eŭkaristion, ricevos nek fermentintan, nek senfermantan. Tiuj ricevos feron sur la piedojn kaj vipon. Atencemo rikanas sur ĉies porkomuzelo.
- PERRIN** Mi protestas. Ni ne estas atencantoj. La porkomuzelo koncernas vin. Ni amas Dion. Pro tio ni revokis vin el la ekzilo. Ne por ke vi sidiĝu sur nian kolon per vipo kaj per viaj ordonnance'oj. Ni elĵetis el niaj preĝejoj la pentritajn kaj skulptitajn bildojn, misalojn kaj tabernaklojn. Vi elĵetas ankaŭ la orgenon; mutigis ankaŭ la sonorilojn. Nia vivo jam similas al viaj stoplej-vangoj. La homo estas nemildigebla sovaĝbesto — vi diras. En kies nomo, ja ankaŭ vi estas nur homoj? Dion ne ami, sed timi oni devas! — magister dixit²⁰. (*Montras al Calvin.*) Laŭ tio ni estas kondamnitaj al ĉiama teruro. Tian Dion ni ne bezonas. Vin timegas malbonuloj kaj angoras ankaŭ bonuloj, ĉar pro nepripensita

20 Magister dixit (*latine*): La majstro diris (t.e. deklaris neerareble)

vorto iam ajn vi povas deklari ilin malbonaj.
Ni volas vivi sen ĉi tiu timo kaj via brido.

FAREL Senbride.

PERRIN Ĉu senbrideco, se ni postulas komuniojn? Ĉu vi volas kondamni nin al paganeco? (*minace*)
Ĉu vi komunios nin, sinjoro Calvin, aŭ ne?

CALVIN Ne! Mi ne komunios vin, dum vi ne ĵuras kun levita mano je la katekismo. Ĉu gajeman, facilaniman Dion vi bezonus? Kun kiu oni povas kartludi kaj drinki — laŭ maniero de grekaj paganoj? Ĉu vi deziras superulojn pri ĉio kapjesantaj por ke atakinte la Ĝenevan Respublikon la romia-germana imperiestro trovu anstataŭ armitajn defendantojn — malĉastajn ebriulojn de Sodoma? La puritana Grekio konservis sian sendependecon, la morale putranta perdis ĝin.

PERRIN Ne ŝirmu vin per la romia-germana imperiestro! Ĉu vi komunios al ni la Eŭkaristion aŭ ne?

CALVIN Vi povas detranĉi al mi la manojn, rompi la membrojn, bruligi la domon, eĉ disŝuti la ostojn de miaj mortintaj idoj, sed neniam vi devigos min per io ajn komunii al vi, malpiuloj, la sanktajn signojn. (*Enpaŝas la poliestro kun la inkvizicia detektivo.*)

PERRIN Do ni serĉos aliloke niajn kristanajn rajtojn. Kaj venu finfine la puriga fulmotondro sur la preĝejon de Sankta Petro kaj tutan Ĝenevon. Nur fulmo, tondro kaj infera ŝtono povos liberigi nin de ĉi tiu inkubo. Ni iru, civitanoj! Nia Majstro deziras fermi la diskuton ankaŭ ĉi-foje per policestro. Sinjoro Servet, pli bone vi faros se vi venos kun ni.

SERVET Mi ankoraŭ restos.

CALVIN *(al la policestro)* Kion vi deziras, Maisonneuve?

POLICESTRO Pariza komisiito de la ĉefinkvizitora moŝto Ory deziras paroli kun la sinjoro ĉefkomandanto.

CALVIN Jen mi.

INKVIZICIA DETEKTIVO La ĉefinkvizitora moŝto petas kun respekto ekstradicii la fuĝintan herezulon Mikelo Servet. *(Transdonas dokumenton.)* Jen la verdikto.

CALVIN Verdikto. Je kio kondamnita?

DETEKTIVO Je ŝtiparumo.

CALVIN *(rigardante la paperon, poste la inkvizician detektivon)* Vi estas kuraĝa homo. Ĉu vi ankoraŭ memoras Lucanius?

DETEKTIVO Mi memoras, sinjoro ĉefkomandanto.

- CALVIN** *(rigardante la paperon)* Tamen ne tro kuraĝa. Vi staras sub la protekto de la franca reĝo Filipo II-a. Nu diru al la ĉefinkvizitora moŝto, ke Mikelo Servet ne staras sub la protekto de la reĝo. Do ni ne ekstradicios lin. Li estas ĉi tie arestita.
- SERVET** *(preskaŭ feliĉe)* Ĉi tie arestita!
- DETEKTIVO** Mi raportos pri tio. Dankon. Ĉu permesite foriĝi?
- CALVIN** Vi povas iri. *(Inkvizicia detektivo for.)* Sinjoro poliestro, restu!
- SERVET** *(por kaŝi sian timiĝon)* Ili tamen prizorgis la lignon.
- CALVIN** Ili malproksimas. Desto pli proksimas, bedaŭrinde, viaj aliancanoj.
- SERVET** Ili aŭdacis veni ĉi tien, la senhontaj inkviziciaj detektivoj. Aŭdinte vian respondon rabio trafos Ory. *(Ridas.)* Estis, malrestis birdo sur la brulŝtiparo. Kun majstra diplomatia sento vi rifuzis al li. Trankviliĝu kaj Loyola kaj la papo, Servet estas arestita. *(al Farel)* Sinjoro ŝtatestretario, vi povas lerni iom da taktiko de la Majstro. Vi volas kapti eĉ papiliojn per tenajlo. Per fero, vipo. Por unusola milda vorto eĉ la Perrin'anoj orumus vin. Kaj

se vi povus elparoli la vortojn: mi eraris, ili kius al vi eĉ la piedojn. Ĉu vi scias, per kio mi komencis la medicinajn studojn? Mi legis ekskluzive tiujn aŭtorojn kiuj refutis miajn konjektojn. Kiu ne kuraĝas fronti refuton: blindiĝas kaj en blindeco ne enestas vero. Ni iru tagmanĝi.

CALVIN Unue ni klarigu vian miskomprenon. Vi estas vere arestita.

SERVET Ĉu mi? La inkvizicia detektivo estas ja for.

CALVIN Restis la libertinoj kun la ideoj de via libro. Dum vi ne retiros ilin publike antaŭ la urbo kaj Eŭropo: vi restos arestito de la Ĝeneva Respubliko. Mi petis vin, ne veni ĉi tien. Nun ni jam devas daŭrigi la debaton.

SERVET Ĉu oni rajtas aresti iun pro principoj teoriaj?

CALVIN Se ili estas malutilaj kaj danĝeraj por la publiko: jes. Tion preskribas la leĝoj de Ĝenevo. Ĉar atendeble, ni estos akuzataj pro la hodiaŭa ribelo, ne sciante klarigi la kaŭzon de ĉi tiu tumulto.

SERVET Ĉu organizis mi la tumulton kontraŭ vi? Vi mem faris ĝin. Disbatu ĝin!

FAREL Nur per ekzemplo. Donante ekzemplon.

- SERVET** Mi ne trudas min en viajn sociajn aferojn. Mi retiras ĉion kion mi diris.
- CALVIN** Kaj kion vi skribis?
- SERVET** Apartenas al la libera spaco de pensoj.
- CALVIN** Pensoj ne havas senmedian spacon. Jam ankaŭ la titolo de via libro ne. Restitutio Christianismi — do dum vi ne restarigas ĝin, ne estas kristanismo.
- SERVET** Ne estas, se tion vi faras al mi ... Ne estas kaj ne estos ... Reĝa Moŝto, la aresto de rektoro Copus estas denova makulo sur via glorplena regnado. La libera esplorado ne povas esti arestita. Kies vortoj ili estas, Johano?
- CALVIN** Kiu ne forgesas: pereas.
- SERVET** Vi do preferas elekti la sangoplenan ŝtuparon de la forgesemo. Ĉu vi mortigis en vi ankaŭ la renaskiĝintan Calvin?
- CALVIN** Mi mortigos eĉ la centfoje renaskiĝintan se mia reformacio deziras. Mi venis ĉi tien ne por mi. *(al la poliestro)* Plenumi vian devon!
- SERVET** Ĉio kion ni petas, Majesto, nuras: tolérance! tolérance!
- CALVIN** Jes! Ĝin ni petas de vi: estu indulgema al ni. Kompatu mian aferon kaj retiru la Restitutio!

POLICESTRO Vian armilon, sinjoro.

SERVET *(Prenas el sia paktuko ekzempleron de sia libro.)* Ĉi-sola ekzemplero restis ...

POLICESTRO Armilon, mi diris.

SERVET *(konfuzite)* Ho, jes ... *(El sia poŝo prenas anseran plumon.)* Jen. Sed demetu ĝin ankaŭ la aliaj. *(dum la poliestro katenas lin)* Surmetu al si katenon ankaŭ la aliaj! Tretantoj de la leĝo! Laŭ la leĝoj de Ĝenevo, kiu akuzas min, mem devas kuniri en la karceron. Devas suferi ankaŭ la verdikton, se li ne konsideriĝas prava ...

CALVIN Ni ne forgesis tion. Policestro! Katenon sur min!

POLICESTRO Ne havatas pli, sinjoro ĉefkomandanto.

CALVIN Haviĝu!

FAREL Laŭ la leĝo akuzanto rajtas havi anstataŭanton. Mi alprenos ĉi tiun rolon, Johano.

SERVET Ne alprenu ĝin, ĉar mi strangolos vin en la ĉelo. Mi diskutos nur kun Calvin.

CALVIN Sub komuna kateno.

FAREL Ĝenevo ne povas resti sen mastro. Pro la filo de Belial, sendito de Satano ...

CALVIN *(al Farel)* Vi transprenos la ĉefkomandecon.

- FAREL** Vi ne povas lasi nin solaj. Ni estas en danĝero. Mi petegas, lasu min kuniri. Eĉ sur brulŝtiparon, se la decido falos.
- SERVET** Por svati, elekti edzinon li povis sendi anstataŭanton. Svati morton li venu mem.
- CALVIN** Mem! (*al la poliestro*) Dividu tiun katenon! Mi ordonas.
- POLICESTRO** Jes, sinjoro! (*Kunligas ilin.*)
- SERVET** Kaj la diskuto estos publika. Ankaŭ mi havos ĉi tie — fanatikulojn.
- CALVIN** Dio estu al ni indulga!

KURTENO

TRIA AKTO

Bildserio kontinua. Necesaj scenejoj: komuna ĉelo de Calvin kaj Servet, juĝejo, predikejo de Saint Pierre, kampo Champel kun brulŝtiparo. La scenoŝanĝon povas indiki martelfrapo de la juĝisto aŭ muziko.

En la arestejo

Du kuŝbenkoj, du tabloj, seĝoj, fenestro al la strato. Armita gardisto sur konvena loko. La tablo de Servet vakas krom du kandeloj sur ĝi. Sur tiu de Calvin: libroj, brulanta kandelo. Servet dormas, Calvin kaj De la Fontaine intertraktas mallaŭte.

CALVIN Jen la akto de akuzo en tridek punktoj. Tuj transdonu ĝin al la enketa juĝisto Tisset. Li sendu kopiojn al Bazelo, Zuriko, Ŝafhaŭzeno.

DE LA FONTAINE Jes. Oni obĵetas ...

CALVIN Oni ne obĵetu ... Ĉu Galesius ekvojaĝis al Londono?

DE LA FONTAINE Antaŭ du tagoj.

CALVIN La predikistoj?

DE LA FONTAINE Ili ekvojis kvardek.

CALVIN Ili direktu siajn raportojn al Farel. Jen la letero en la afero de la lionaj studentoj. La tuta reformita mondo postulu ilian absolvon. Sen nia unueca protesto ili perdiĝos. Pri la nova strategio de De la Baume mi petas informon en tri tagoj. La bernanoj ekmarŝigu almenaŭ ducent armitojn, ĉesu diskuti pri senfermenta pano, komencu organizi sian armeon. Perrin?

DE LA FONTAINE Li postulas por li advokaton ... (*Montras al Servet.*)

CALVIN Ĉu por plia blasfemulo? Superflue. Ĉu la Rue-des-Allemands'anoj jam ĵuris?

DE LA FONTAINE Triono da ili estas arestita, kvarono fuĝinta ...

CALVIN Duoblan gardon al la pordegoj de la urbo. Persone registru ĉiun.

DE LA FONTAINE Farite. Sinjoro Farel liberigis la putinojn kaj trompludistojn.

CALVIN Kial li aŭdaciŝ?

DE LA FONTAINE Por ke ili miksiĝu inter la ribelantojn kaj raportu ĉiutage.

CALVIN Diru al sinjoro Farel, ke ni defendas la regionon de Dio ne per putinoj. Pro la troigoj mi starigos lin antaŭ la presbiterian tribunalon.

DE LA FONTAINE Li opiniis pli rezultiga ...

CALVIN Kredanton kredanto observu! Fervoretulon fervorulo! Laŭ libervola servo, kiomfoje mi ripetu al li?

DE LA FONTAINE Ankaŭ ŝia moŝto petas: bonvolu konsenti, ke mi anstataŭigu la Majstron kiel civila akuzanto en la arestejo.

CALVIN Diru al ŝia moŝto, ke mi estas leĝdonanto, do servanto de la leĝo. Mia frato Antono ne foriĝu de ŝi. Nu, iru!

DE LA FONTAINE (*Blovestingas la kandelon.*) Dum ĝi tute ne konsumiĝas — kune kun la Majstro ... Dekokhora servo eĉ por li trosufiĉas ... (*For.*) (*Calvin brakokruce observas Servet. Voĉo el la strato: "Calvin! Calvin! Calvin!"*)

SERVET (*Vekiĝas pro peza tusado.*) Oni vokas la demonon de la laboro.

CALVIN Ne min.

SERVET Da Calvin estas nur unu.

CALVIN Sed da iliaj hundoj amaso. Viaj adeptoj nomas siajn hundojn pri mi. Ĉiu gardhundo

estas via advokato. (*Nova voko: "En Rodanon kun li! Sub akvon kun li!"*)

SERVET Ĉu ankaŭ tio vin koncernas? (*post kapjeso de Calvin*) Kial oni volas dronigi vin?

CALVIN Por ke vi povu transpreni la gvidon de la Ĝeneva eklezio.

SERVET Ĉu mi fariĝis tiel potenca?

CALVIN Verki pligrandigas. Precipe misideoj. La trian nokton ni diskutas pri tio.

SERVET Dum la priaŭskulto mi ĉion agnoskis, rekonis, prenis sur min. Ĉi tiun akuzon mi refutas. Neniam mi volis okupi vian lokon.

CALVIN Ankaŭ mi ne. Estis altrudita minace de malbeno. (*Bukedo enflugas trafenestre.*) Vin oni altrudas per floroj.

SERVET (*flarante la florojn*) Mia reĝino. Mi songis, ke ĉi tie ŝi vagas, serĉas min tra la urbo. Ŝia ruĝa koro: sur la malfermita mano. Ĝi ne plu estas via simbolo. Vi devas ŝanĝi ĝin.

CALVIN Je kio?

SERVET Je brido. Vipo. Je via ŝatata devizo: Mastro de spita azeno nomiĝas vipo. Ho, spita azeno, vi putrinta viandamaso, peka homaro!

CALVIN Ne nigrigu! Defendu vin! Vi studis juron, vi devus scii, ke rifuzantoj de la Triunuo estis

punataj per morto jam dum la unuaj Cezaroj, antaŭ la Nicea Koncilio. (*Ĵetas librojn sur la tablon de Servet.*) Jen, mi portis ilin al vi por konvinki vin, spita azeno! Kodo de Justiniano, De Catolica Fidei, De Haereticis ...

SERVET Mi estas trista, min ne interesas viaj dogmoj.

CALVIN La vero vin interesu.

SERVET Ĉu vin la vero interesas? Lucanius, vin interesas nur la proprietigo de la vero. (*nova bukedo*)

CALVIN Gardo! Tabulumu la fenestron! (*Voĉo de gardisto: "Tabulumu la fenestron de la sepa!"*)

SERVET Ankaŭ la buŝojn, okulojn, orelojn, gardo! Blindan fenestron al la ĝenevanoj, imitaĵojn de la libereco. Tabulumu ankaŭ la ĉielon, Dio ne vidu, kio okazas en Lia nomo eksterre!

CALVIN (*Prenas leteron el la bukedo.*) Ne vidi, sed por legi. Jen mesaĝo al vi: Doktoro Servet, baldaŭ ni liberigos vin. Strangolu la arestitan diktatoron, la malliberigan malliberulon, la grandan iluziiston! Tiel do parolas la rozoj.

SERVET (*ektime*) Kun neniuj mi konspiris.

CALVIN Aliaj konspiras en via nomo. Gardo!

- SERVET** Mi ne volis, nek volas esti flago de la Per-rin'anoj!
- CALVIN** Tio estas problemo ne de volo, sed de situa-cio.
- SERVET** Mi ne estas homo de agoj. Libron mi verkis, ne batalprogramon. Ne leĝojn! Mi kontem-plas laŭ mia konscienco, volas loĝiĝi en ne-nies cerbo.
- CALVIN** Mensogo! Ankaŭ vi ĉasas adeptojn. Homo homon ne povas senpune renkonti. Ni pre-mas la proprajn stampojn sur la frunton de la aliaj. Notu, Mikelo Servet, ĉiu nia vico skribita estas ruĝa stampo en la animo de la leganto. Gardo! (*al la enpaŝanta provoso*) Ĉi tiun leteron tuj transigu al sinjoro Farel. Mi petas eskorton. (*al Servet*) La diskuton ni daŭrigu antaŭ la enketa tribunalo.
- SERVET** Do ni iru komedii. Je mia savo mi ĵuras: kun neniuj mi konspiris. (*Etendas la manojn al la enpaŝanta provoso por ke li surmetu la kate-non.*) Laŭordone, sinjoro. Ĉu denove nur min koncernas la katenon? (*Rigardas al Cal-vin, kiu honteme rigardas siajn manojn.*)
- CALVIN** (*kolere*) Provoso! Katenon! (*La provoso kate-nas ankaŭ Calvin.*) Eskortu ĉi tiun sinjoron kaj mi petas provoson ankaŭ post mi!

- SERVET** Ni tintigos la ĉenojn en la stratoj de la urbo. Neniu el ni volas eskapi, bone vi scias, Calvin. Tamen vi insistas pri la komedio. Vi volas vekti malamon al mi kaj bedaŭron al vi. Mendu do eĉ tamburadon! Gardo! Orkestro! Muĝantan amasiĝon al la unika spektaklo! *(Ili ekiras eksteren, renkonte venas Idelette.)*
- IDELETTE** Forigu tiujn ĉenojn de la manoj de mia edzo! *(Laŭ mansigno de Calvin la provoso flankenigas kun Servet.)* Kion vi faras, Johano! Oni logas vin en kaptilon. Vi kuras al via pereco!
- CALVIN** Mia vero ne pereas, Idelette. Kiel vi kuraĝis forlasi la domon tiel grave malsana?
- IDELETTE** Farel petegis min, petegi vin, Johano, ne aperu katenita antaŭpublike. Ne ligu vin al tiaj leĝaj formoj.
- CALVIN** Mi estas devigata.
- IDELETTE** Viajn adeptojn timigos ĉi tiu vidaĵo, viaj malamikoj ekflaros sangon. Vi restos forta nur se vi vidiĝas tia. Vi lasas fali vian sangon sur neĝon, vi incitas luphordon al vi, Johano, amata mia. Lasu min demeti ĉi tiun honton de viaj manoj.
- CALVIN** Ĉu honton?

- IDELETTE** Humiligan!
- CALVIN** Humiligan?
- IDELETTE** Ĉar ne veran, ne realan.
- CALVIN** Ĉu ne veran, ne realan?
- IDELETTE** (*montrante al Servet*) Ĉe la alia estas tia, reala.
- CALVIN** Ĉe la alia ... Idelette ... ĉu eĉ vi tiel parolas? Eĉ vi opinias min komedianto? Eĉ mia kun-sortulino ...
- IDELETTE** Ne akuzu min!
- CALVIN** Antaŭ nelonge vi diris: mi lasas fali mian sangon sur neĝon ...
- IDELETTE** Jes. La Perrin'anoj revas vidi vin en kateno. Sur brulŝtiparo. Sed nun vi spitas ne ilin. Vi luktas kun via necerteco. Vi ne povas vidi vin mem, Johano. Neniam vi rigardis en spegulon. Abismo malfermiĝis en vi. Teruro sidas en viaj okuloj: timo, kiun vi neniam konis. Io timigas vin, jen kial vi trokuraĝas, eskortigi vin en ĉenoj preter la Perrin'anoj. Eble eĉ ne preter ili. Nur preter Mikelo Servet. Viaj voĉo, kredo, celo, vero ne plu sufiĉas. Vi pliigas ilin per rolo. Per memordonita ĉeno. Per pentrita sango aktora. Johano, ne inde al vi! Ne inde vi rilatas al vi mem.

- CALVIN** Do oni senigu min je ĉiu potenco! Jen mi abdikas ...
- IDELETTE** Ne, ne!
- CALVIN** ... ĉiujn miajn oficojn, Servet sidiĝu en mian seĝon, por ke de tie mi forpuŝu lin kun lia herezo. Gardo! Retro tiun hispanon!
- IDELETTE** Johano, kara sinjoro mia, repaciĝu!
- CALVIN** Li transprenu la gvidon de la urbo, ni metu la kapon sub la jugon aŭ glavon de la Perrin'anoj, ĉar mi povos altigi mian veron ĝis la ĉielo, Idelette, eĉ sen faritaj ĉenoj, eĉ sur eŝafodo. Se mian veron baros mia situacio, mi eksplodigos min ĉielen kaj argumentos per miaj refalantaj karneroj — eĉ kontraŭ la tuta mondo. Ankaŭ kontraŭ vi, Idelette, se vi tiel opinias ...
- IDELETTE** Al vi kuraĝas diri la veron nur tiu, kiu tre malamas aŭ amegas vin. Post kiam mi kuraĝis paroli, klasifu min, kien vi konsideras ĝusta, Johano!
- CALVIN** Pardonu min ...
- IDELETTE** La gardisto vidis vin plori nokte.
- CALVIN** Dormo ludis kun mi.
- IDELETTE** Turmento de sendormeco. Depost kiam Servet aperis, vi apenaŭ fermis la okulojn.

- CALVIN** Plej bone estus ŝtiparumi nin ambaŭ.
- IDELETTE** Vin haltigis la unua kontraŭopinio. Vi pretus lasi al perdo vian tutan laboron pro detaleto. Nur lin vi vidas. Kvazaŭ vi renkontus vian malforton.
- CALVIN** Eh, ne ...
- IDELETTE** Neniu krom mi scias tion, Johano. Nur vin mi observas de pluraj jaroj. Mi vidis vin sane, nun povas rigardi vin ĝis tagiĝoj el inter miaj kusenoj. Super ĉiu via libro mi vigilis kun vi; kun miaj tagoj konsumiĝis viaj plumoj, sekiĝis viaj inkujoj. Mi ne eraras juĝante pri vi.
- CALVIN** Donu konsilon, Idelette!
- IDELETTE** Lasu min depreni la katenon.
- CALVIN** Nur kun tiu de la alia ...
- IDELETTE** Do lasu lin libera!
- CALVIN** Ĉu mian malforton?
- IDELETTE** Vian iaman kunstudenton.
- CALVIN** Ĉu mi akceptu la malvenkon? Reto de konspirantoj subtenas lin.
- IDELETTE** La pli forta devas surpreni la riskon.
- CALVIN** Sed nun pli fortas li. Pretas morti. Havas nenion, nur sian vivon. Kaj al mi ne permeseblas morti. Ĉio disfalus post mi. Evidente tio

lin ne interesas. Ĉar li metis sian vivon sur unu karton kaj postulas de mi la samon. Mi devus komprenigi al li, ke mia vivo pli gravas ol lia. Sed ĉu vere tiel estas? Estu ajne, mi konsideras ĝin pli grava, pro tio mi hontas antaŭ li.

IDELETTE Ne diru tion! Eĉ konjunkcio ne estas en via vivo, pro kiu trafus vin honto. Vi troviĝis jam en la faŭko de la Morto.

CALVIN Tiam mi estis samgrade libera. Mi disponis mian vivon kiel ununuran glavon. Eble mi eraris profundigi en ĉi tiun diskuton. Alvenis ĉi tiu homo sensuspekta, naiva kiel infano, transdonis al mi sian libron, siajn konsiderojn sur malfermita mano ... mi devus forpeli lin ... Sed nun ununura voĉo decidis en la konsilio, kiu el ni paŝos sur la brulŝtiparon. Kaj mi ne scias, kial ni luktas: ĉu por neniiĝi lin aŭ ĉar mi kroĉiĝas al la vivo.

IDELETTE Vi devas kroĉiĝi al ambaŭ aferoj, Johano. Sed vi devas venki lin en la publika debato. Demetigu la katenon ankaŭ de liaj manoj! Vi posedas miraklan oratoran forton, Johano, kunvokigu la tutan loĝantaron de Ĝenevo, ĉiujn kantonojn, vi vidos, urbo post urbo sekvos vin, ĉar vi moligas ŝtonojn se vi ekpa-

rolas. Mi petegas, je la memoro de niaj gefiloj, mi petas vin, ne surmetu ĉi tiun pentritan katenon, vi ne bezonas ŝajnon, nek ludi akuzadon kiel ĉefakuzanto se vi klare scias, kie kuŝas la vero!

CALVIN Laŭ la leĝo mi prenis sur min lian sorton kaj ankaŭ la punon se oni voĉdonos kontraŭ mi!

IDELETTE Vi prenis nenion sur vin. La ŝlosilo de la kateneno de Servet troviĝas en via mano. Ĉu ĝi ne bruligas vian manon? Prefere mortu ol per falsaj kartoĵoj ...

CALVIN Idelette, vi brulstampis min trompludisto! Dio mia! Ununura verdira kunulo de mia vivo perdis la saĝon.

IDELETTE Kion mi diris ... Pardonu min! Ne, ne, ne, mia edzo ne ludas trompe, ne tion mi volis diri. Mi volis diri nur ... kaj ankaŭ ne tion, ke vi mortu; vi devas scii, ke ne estas inde al vi, ne lasu interŝanĝi vian animon, Johano ... vi ne estas plu, kiu vi estis ... Dio mia, mi apenaŭ vidas vian vizaĝon ... nur nebulajn konturojn mi vidas, Johano.

CALVIN *(Kaptas la falantan virinon.)* Idelette ... Gardo! *(al enkuranta gardisto)* La katenon! Deprenu ĝin! Deprenu la katenon! *(La provoso deme-*

tas la katenon de Calvin kaj eliras.) Idelette ...
Kio estas kun vi? Kio okazis al vi?

IDELETTE *(palpinte la pojnojn de Calvin)* Tiel mi vidu vin ĉiam ... libera ... Kun liberaj manoj ... Al neniuj submetita, nur al via honesto. Neniu restos post ni, Dio forprenis niajn gefilojn ... se vi makuliĝos, eĉ unu filo ne restas por defendi vin. Dio mia! Johano! Johano! Johano! Mi vidas la stampon de Kain sur via vizaĝo. Sur via pura, bela vizaĝo. *(Ploras.)*

CALVIN Idelette, kara mia. Trankviliĝu! Via vizaĝo palas kiel blanka tolo.

IDELETTE Tranokte mi vomis sangon. Baldaŭ mi foriros.

CALVIN Ne spitu la Dian intencon! Venu, ripozu, kara!

IDELETTE Sur via karcera lito ...

CALVIN Provoso! Venigu kuraciston! Vi jam vidas min, Idelette, ĉu?

IDELETTE Mi jam vidas vin. Mi volus vidi ankaŭ Mikelon Servet. Sen kateno.

CALVIN *(Vokas.)* Venigu Mikelon Servet! Tiel vi vidos lin.

IDELETTE Kaj vi ambaŭ eliros al Saint Pierre.

CALVIN Ni eliros.

IDELETTE Vi starigos al li pupitron, por ke li defendu sin libere ...

CALVIN Mi starigos pupitron. Por ke li defendu sin libere.

IDELETTE Akvon ... Via karcero turniĝas kun mi. (*Pro-
voso enkondukas Mikelon Servet; la unua, laŭ
gesto de Calvin, restas en la pordo. Servet en-
iras, haltas antaŭ Idelette.*)

CALVIN Jen Mikelo.

IDELETTE Deprenu lian katenon. (*Calvin malkroĉas la
katenon de Servet.*) Tiel estas pli agrable vidi
vin. Sub trudo oni perdas la vizaĝon. Fru-
matene, kiam mi perdis multan sangon, la
Savinto aperis antaŭ mi. Mi aŭdis Liajn
unuajn vortojn postsurektajn: "Pacon al
vi." Li ankaŭ ordonis: "Lasu vian donacon
antaŭ la altaro kaj iru unue interpaciĝi kun
via kunfrato!" Nun mi jam vidas vian viza-
ĝon lumplena, Johano. La Kaina stampo ma-
laperis. Ankaŭ la vian mi vidas luma, mal-
feliĉa Mikelo Servet. Anstataŭ via patrino mi
petas vin: indulgu vin, indulgu ankaŭ lin
(*montras al Calvin*), ne spitu! Ununura vivo
doniĝis al vi, malfeliĉa Mikelo Servet.

En la juĝejo

Ĉe la maldekstra tablo: malhele vestitaj predikistoj, partianoj de Calvin, ĉe la dekstra: Perrin'anoj pli hele vestitaj. Meze: Farel. De la Fontaine skribas protokolon.

- SERVET** Civitanoj, kunfratoj miaj! Mi volas al vi komuniki, ke miajn vortojn pri la rilatoj de potencoj en Ĝenevo, eĉ mian plej bagatelan kritikan rimarkon, penson pri ili — mi retiras.
- PERRIN** Voĉo de la streĉpulio kaj arda fero. Ne la opinio de la sinjoro doktoro.
- SERVET** Mi pekis kontraŭ la urbo. Sen permeso kaj komisiono, eĉ pli: ekster la kadro de la eklezia konsilio mi esprimis opinion surstrate pri viaj aferoj.
- PERRIN** Parollibero rajtas iri ankaŭ surstrate!
- FAREL** Kun buŝumo. Por herezula buŝo devigatas pikdrata buŝokorbo.
- SERVET** Mi retiras ne nur kion mi diris, sed ankaŭ kion mi vidis.
- FAREL** Li mokas.
- PERRIN** Voĉo de timo! Ne de moko!
- SERVET** Mi vidis la freskon de Satano, ne la realon. Elpiku al mi la okulojn, kiuj vidis alion ol ili

devas. La civitanoj de Ĝenevo vivas libere. Mi babilaĉis senpripense pri trudkreduloj. Mi certigas vin, sinjoroj, ke vi ĉiuj pensas per la propra kapo, vi ne havas salajratajn pensistojn, la universala vero havas ĉi tie neniam ĉefluanton. Ĉar se Dio estas unu kaj nedisigebla ...

FAREL Li estas kontraŭ la Triunuo! Protokolu!

SERVET ... se la Sinjoro estas unu kaj nesidigebla, la vero kontraŭe: povas validi nur dividite.

FAREL Kiom da homoj, tiom da veroj, konceptoj, religioj, tiom da disciplinoj kaj kristanismoj, ĉu ne? (*Calvin kapjesas.*)

SERVET Tiom da koroj kaj cerboj — sub la aŭspicioj de la vero. Investitaj en la rajton de la libera esplorado. (*ekscitite*) Kiu vi estas, ke vi damnas aliulan serviston? — demandis prave apostolo Paŭlo. Ĉi tiu opinias unu tagon pli distinga ol alian, por tiu ĉiuj tagoj egalas. Ĉiu estu konvinkita pri la propraj konsideroj — jen la sole ebla homa stato. Kiu zorgas pri la tago: zorgas pro la Sinjoro, kiu ne zorgas pri la tago: pro la Sinjoro ne zorgas. Inter ni neniu vivas por si mem, neniu mortas por si mem. Do ajne ni vivas kaj mortas, ni apartenas al la Sinjoro. Ĉiu mem donas kalkulon

antaŭ Dio. La libereco estas ne eksteraĵo, sed la interna homo.

PERRIN Sen ekstera trudo. Sen ordonnance'oj!

SERVET Mi humile ekskuzas min antaŭ la konsistorio: la kaŭzo de miaj babiloj estas ne malamo, sed ordinara nescio. Lasu min reiri sur la kampon de la libera pensado! Post la sekretoj de kadavroj mi volus esplori tiun de la ĉielo. Kion malbone mi vidis, estas mia kulpo; mi observadis tro malalte. Permesu al mi reiri el ĉi tiu pita homa tumulto al Ptolemajos kaj la astroj! Mi promesas neniam forturni la okulojn de sur la ĉielo. La meteoroj ne estas ofendiĝemaj.

PERRIN Li estu liberigita! Ĉesu la proceso! Ĉesigu ĝin kaj parolu libere, el via koro; ni subtenas nian opinion ne per galero, glavo, malliberejo kaj torturbenko. Ekzekutistoj ne apartenas al niaj argumentoj. Diris vi tion, Farel, dum la debato en Berno. Ĉu vi ja ne devoras viajn proprajn vortojn kiel koncipinta skorpiino sian virkunulon?

FAREL Mi estas ne skorpio, sed servisto de la evangelio.

- PERRIN** Servisto? Inter tiranojn ni ankoraŭ ne vidis tiel grandan kiel potenca vi estas inter la servistoj.
- FAREL** Vi grincigas kontraŭ ni la dentojn kiel rabia hundo kaj sputas vian naŭzan salivon kontraŭ la aŭtoritato de la Majstro. Servisto mi estas, mi ne neas tion: tapiŝo de la aŭtoritato. Ĉar vi volas ekzili lin el tiu ĉi urbo, kies morojn li bridis fortamane. Sed antaŭe tranĉu la rimenojn el mia dorso, skulptu bastonon al vi el miaj ostoj ...
- PERRIN** Ni ne parolas kontraŭ li! Ni repostulas de li la liberecon de nia konscienco!
- FAREL** La plej danĝeran el la diablaj instruoj. Libertas scientiae diabolicum dogma! (*Montras al Servet.*) Jen ĝia viva, ankoraŭ vivanta ekzemplero. Rigardu lin kaj legu liajn instruojn ...
- PERRIN** Kie estas la libro?
- SERVET** Legu, studu ĝin! (*Spasme ekridegas.*) El cindro ... legu miajn enflamigitajn librojn ... (*Ridegas.*) Sur durada ĉaro vi portis eĉ la lastajn ekzemplerojn al eŝafodo ... Legu ilin ... (*Ridegas.*) La vorto haltas en la gorgo de la kontraŭulo ... (*Ridegas.*) Ĉar vi tratanĉas la gorgon al li. Aŭskultu ... legu ilin ... Dio, legu ilin

ĉar la cindro de miaj libroj ... suprenflugas al Vi. Vi sola kapablas kunmeti miajn vortojn ... ja Vi inspiris ilin ... (*Komencas tusi, poste sufokiĝi.*) Mi ekskuzas min. Ne decus al mi tiel boji antaŭ la sinjoroj ... Vane mi peticiis ĉe la karcerestro por pli varma vesto. Min devoras pedikoj kaj puloj ... (*Montras al Calvin.*) Certe ankaŭ mian kunĉelanon, sed pri li zorgas edzino. Decus tamen dividi miajn pedikojn. Komuna kateno, komunaj insektoj.

FAREL

Li devas labori.

SERVET

Prave, prave! Li serĉas argumentojn kontraŭ mi en la kodo Justiniana. Sed almenaŭ serĉas. Ne devoras min vivantan, kiel Farel, la skorpio! (*Tremas frosteme kiel en la unua akto.*)

CALVIN

(*al De la Fontaine*) Akvon!

SERVET

(*Tusas, poste al la sekretario tenanta la kalikon.*) Vi estas feliĉa homo, La Fontaine. Oni notadas, protokoladas al papistoj, reformitoj kaj morgaŭ eble al la kontraŭreformacio ... ho, feliĉa kameleono! Glaciepoko, ŝtonepoko, ferepoko kaj kameleona epoko. Ĝin kreis sinjoro La Fontaine. (*De la Fontaine senvorte residiĝas.*)

- FAREL** Por diskuti ni venis, ne por insulti.
- SERVET** *(Ridegas.)* Diskuti! Kun vi! Dio mia! Teologo kun pendumologo. Pendumu lin, Johano, ne lasu ĉi tiun ŝakalon bleki kontraŭ mi. Ĉu vi aŭdis, kion li diris? La pensado estas diabla funkcio. Ĉu vi ne elvomas la stomakon? Mi estas kuracisto, sekcis eĉ sorikon. Veninte en danĝeron ĝi eligas fetoron. Ĝi batalas per fetoro kiel ĉi alia rongulo. Ĉiuj liaj konjunkcioj fetoras je maltoleremo. Libertas scientiae ... Ligu min! Ĉenon sur miajn manojn, alie mi strangolos lin ... *(Impetas kontraŭ Farel, Perrin retenas lin, poste ankaŭ la provoso.)*
- PERRIN** Sinjoro Servet ... bonvolu lasi ...
- SERVET** Mi mortigos lin!
- CALVIN** *(mallaŭte)* Elkonduku lin!
- SERVET** *(Kiun jam nur la provoso skutiras eksteren.)* Al vi mi venis, Johano Calvin, kun vi mi diskutos eĉ en la tombo, sed ne lasu, ne toleru ĉi tiun infamion! Ordonu eltiri al mi la langon, sed ne allasu min al viaj adeptoj! Ne ĵetu viajn perlojn antaŭ la porkojn, ne devorigu min per viaj servistoj! Ho, libertas scientiae! Ho libera konscienco konsumigita per sorikoj ... *(Oni forkondukas lin.)*

- FAREL** *(post longa silento)* Freneziĝinta. Ni devus preĝi por li.
- PERRIN** Tro frue, estimata konsistorio! En kies nomo vi volas kondamni ĉi tiun homon?
- CALVIN** En la nomo de la Dia vero.
- PERRIN** Ĉu ĝi estas deponita en viaj manoj?
- CALVIN** Kun via aprobo: en miaj.
- PERRIN** Ĉar tie kuŝas ankaŭ la karceraj ŝlosiloj.
- CALVIN** Dum danĝero ankaŭ karceraj ŝlosiloj aldoniĝas al la Dia vero. Eĉ kanono, sinjoro Perrin. Kontraŭ insidoj de malpiuloj.
- PERRIN** Do kial vi ne dispafigas nin?
- CALVIN** Mi ne volas malpacon inter ni. Ĉu ni promenu kune en la faŭkon de la papistoj?
- PERRIN** Mi konfesas min reformito, mi same ne deziras internan malpacon. Sed per la vortoj de Marteno Luther mi postulas: lasu la animojn impeti unu kontraŭ alia!
- CALVIN** Opinio muzikista. Luther estis muzikisto en la politiko. Li havis nur la bonŝancon ke dum la imperiestro diboĉis en Madrido, la princoj elektistoj transpartianiĝis al li. Tute ne pro la evangelio, sed pro bienoj de la katolika eklezio. Kaj malfeliĉe por ni ĉiuj, ke li ne nur toleris skismulojn, sed per siaj vortoj

akceptitaj de vi li malfermis pordon al plej damninda oponado. Komprenu bone, ke la muregojn de Zuriko en 1531 konkeris ne la papistoj, sed nia propra malforto: la dividi-teco, la opoziciemo dikiĝinta per gapa cedemo: lasu, ke viaj kontraŭuloj prediku sentime kaj vigle! Saltu ankaŭ vi unu kontraŭ alian en la tendaro de la Reformacio kiel ankaŭ Luther cedis la pugnoj kontraŭ Zwingli — pro nuancoj religiaj! Kaj la rezulto? Malvenko ĉe Kappel. La falo de Zuriko kaj kvaronumo de Zwingli. Dia juĝo, diris tiam Luther forgesante, ke ankaŭ li havis parton en la batalperdo. Li devus ne diskuti kun Zwingli, sed alianciĝi! Ni diskutadu kompreneme, senfine, erari estas ĉies plej sankta rajto, sekve ankaŭ batalperdi; la venko ne estas deviga, sed ni rajtas perdi ĉion. Ĉiu soldato rajtas pafi kien ajn li volas, ankaŭ malantaŭen, se tio plaĉas al li. Pro la rajto erari, pro la rajto diverse opinii. Pafu do, Mikelo Servet, kontraŭ niaj soldatoj, kontraŭ la dieco de Kristo kaj se ni iĝos polvo kaj cindro — la rajto je eraro ekkantu sian himnon super ni. Ne galopu, ne impetu kiel blindigita ĉevalo! En la eŭforio de la potenco Zwingli mem

PERRIN

fosis sian tombon. Li lasis metiĝi sub nutraĵan blokadon samtempe kvin kantonojn kun malforta armitaro kaj malplenaj manĝkajeroj. Liaj militestroj estis nekleraj fari-zeoj kaj neniuj kuraĝis reteni lin en la reali- go de liaj planoj. Li ekstermis fakte la since- ran, malkaŝeman konduton — samkiel vi — eĉ ĉe stratpurigistoj. La malamiko ankoraŭ malproksimis kaj Zuriko jam ŝanceliĝis sangoperde pro timo kaj malfido. La timo semita de vi en nin, estas la aperta vundo de la eklezio.

FAREL Jen alia herezulo!

PERRIN Vi blekis ĉi tiun vorton jam en la patrino sino. Kaj ankaŭ pendumilon. Kia fido devus firmiĝi en Zuriko sekve de la deviga frekven- tado de preĝejo, aro da denuncantoj, kance- lario flaranta ĉirkaŭ la moralo kaj sekreta konsilio ĉirkaŭ Zwingli estiginta interne de ĉi tiu pluan pli sekretan? Ĉu tia konsilio juĝu pri Servet? En la preĝejon kun li! Venku lin en publika debato!

FAREL Ĉu por ke li infektu la tutan urbon?!

PERRIN Kio estas vivkapabla, ne infektiĝas eĉ en pu- blika debato.

- CALVIN** Nu, bone. Estu publika debato! Sed sen incito al kaŝmurdo.
- FAREL** Jen mesaĝo kaŝita en rozbukedo. Doktoro Servet, baldaŭ ni liberigos vin. Strangolu la arestitan diktatoron, la malliberigan malliberulon, la grandan iluziiston! (*montrante al Perrin*) Tion skribis vi ...
- PERRIN** Mi protestas.
- FAREL** Mi petas la konsistorion ke ĝi pridecidu la tujan liberigon de la privata akuzanto Johano Calvin.
- PERRIN** Ni ne privoĉos tion.
- FAREL** Laŭ la leĝo ĉiu privata akuzanto rajtas starigi anstataŭanton en la arestejo.
- PERRIN** La argumento estas ridinda. Privata akuzanto havas nenion farendan en la ĉelo de akuzato. Kiu altrudis Calvin?
- FAREL** La konscio pri sia pravo kaj senkulpeco. Kaj la espero resaĝigi la herezulon.
- PERRIN** Li translokiĝu en alian angulon de la arestejo. (*tondro de kanono malproksima*)
- CALVIN** Kio estas tio, Farel?
- FAREL** (*kun suspektinda trankvilo*) Episkopo De la Baume. Milita ekzerco.

POLICESTRO (*Envenas ekscitita.*) Permesu al mi, sinjoro ĉefkomandanto, anonci, ke princino Renata mesaĝas urĝe. Sekrete.

CALVIN Diru do! Ju pli malfavore des pli bone por ni. Pro nia unueco.

POLICESTRO Karolo V-a ofertis Ĝenevon al la papo preze de packontrakto. Li almarŝigis milkapan soldularon.

CALVIN Ni meritas tion. La lancoj finos nian diskuton pri la libera batalo de opinioj. (*ektimo ankaŭ en la grupo de Perrin*) Dankon. Atendu min ekstere! Kiu transprenos la rolon de privata akuzanto?

FAREL Mi.

CALVIN Vi devos veturi Zurikon por milita helpo.

DE LA FONTAINE Mi. (*Ankaŭ la predikistoj anoncas sin.*)

CALVIN La Fontaine. Konatoj delonge, ne okazos strangolado. Ĉu iu kontraŭopinias? Neniu? Ĉi-tage la Fontaine transprenis la rolon de privata akuzanto. Kaj por ke estu nenia proforma eraro, sinjoro Perrin, kun tuja validulo al Maisonneuve!

POLICESTRO (*Envenas.*) Ordonu!

CALVIN Sinjoro poliestro, arestu sinjoron De la Fontaine kaj konduku lin en karceron! Sed

sen katenoj. Ekde hodiaŭ ni malpermesas la uzadon de katenoj. (*De la Fontaine stariĝas.*) Residiĝu! Finu la protokolon! Skribu: Laŭ la ĉi-validaj dekretoj de la rilata leĝo de la jaro 1542 kiel privata akuzanto de Mikelo Servet anoncis sin Nikolao de la Fontaine por anstataŭi Johanon Calvin ... Sed kial vi anoncis vin?

DE LA FONTAINE Responde al la interflustroj, Majstro, laŭ kiuj mi kuiris unu kaĉon kun la akuzato en Vienne. Mi volas sensuspektigi min.

PERRIN Jen la kuraĝo de teruro.

CALVIN Sinpurigo de kuraĝuloj je siaj eraroj. Do vi anoncis vin akceptante, ke kaze de eventuala absolvo de la akuzato, vi devos suferi la saman punon, je kiu kondamniĝus la akuzato ĉe pruvita kulpeco.

PERRIN Ni esperas, ke li havos ŝancon je pruvo.

CALVIN Vi povas iri. (*Dume De la Fontaine foriĝas kun la policestro.*) Sinjoro Perrin, ne forgesu Tomase palpi, por ke evitiĝu iluziigo.

PERRIN Komedio. Ĉu estos publika debato aŭ ne?

CALVIN Morgaŭ je la 11-a horo en la preĝejo Saint Pierre. Ni starigos eĉ pupitron al la kontraŭulo.

- FAREL** Ĉu dum la papista danĝero staranta antaŭ nia sojlo?
- CALVIN** Ĝuste pro tio. Ni vidu, en kiu kia animo loĝas.
- FAREL** Ĉu por ke li infektu per herezaj opinioj ankaŭ tiujn, kiuj eĉ ne aŭdis pri tio?
- CALVIN** Mi depuŝos lin kiel fenditan sonorilon. Mi fandos el li kanonkuglon kaj pafos ĝin en la ventron de episkopo De la Baume. *(al Farel)* Kunvoku tuj la defendan komisionon!

En la karcero

Ĉiuj sonoriloj de la urbo sonas. Ekstere provoso najlas tabulon sur la fenestron. Servet preĝas senvorte, peze kliniĝinte. Voĉoj el la strato: "Venu, fratoj, al la debato! En Saint Pierre, je la 11-a. La libertinojn ne enlasu! For la Perrin'anojn el la preĝejo!" Poste silento.

- SERVET** Helpu min, Dio mia, en ĉi tiu peza horo de la vivo! Ne estingu en mi, Sinjoro, la kandelon; vi bruligis ĝin per la evangelio de Sankta Mateo, vi ordonis al mi paroli kaj kondamnis la silenton al eterna fajro. Oni bruligas kandelon ne por kaŝi ĝin sub kloŝo, sed por eningigi por ke ĝi disigu sian lumon al ĉiuj

en la domo. Pensemaj homoj, vi estas la lumo de la mondo; urbo konstruita sur monto ne kaŝeblas. Vi ja ordonis, Sinjoro: Kion mi diras al vi en mallumo, diru en lumo kaj kion vi aŭdas flustri en orelon, anoncu de sur tegmento! Mi scias bone, ke pro tio frato donas sian fraton, patro sian filon al morto; kaj ribelas idoj kontraŭ siaj gepatroj kaj mortigas ilin. Tamen ne timu ilin ĉar ne estas kaŝaĵo kiu ne malkovriĝas kaj sekreto kiu ne disfamiĝas. Kaj ne timu tiujn kiuj mortigas la korpon, prefere timu tiujn kiuj pereigas kaj la animon kaj la koron en Geheeno. Via verko, Sinjoro, estas la instigo, la inspiro formanta miajn vortojn; la sorĉo de la gregogarda Jakob en niaj trinkaĵo, panpeco, amo, intencoj kaj en ĉiuj niaj hezitemaj gestoj faritaj por la vero, kiu loĝas en ni kaj kiu tamen tiel malproksimas, ke nur en sonĝo ni povas doni al ĝi kuŝejon.

(La Kanto de Galeruloj aŭdiĝas el Saint Pierre. Servet aŭskultas ĝin mallongan tempon, poste ankaŭ li aliĝas. Kelkajn taktojn postrestante li kantas: "Rekonsciiĝu, amata Sion ... ")

CALVIN

(En, atendente ĝis Servet finas kanti.) Kial vi kantas? Kial vi ne preparas vin al la debato?

- SERVET** Tro frue.
- CALVIN** Baldaŭ estos la 11-a.
- SERVET** Mi volus peti prokraston.
- CALVIN** La sesa posttagmeze, ĉu konvenas?
- SERVET** Post cent jaroj.
- CALVIN** Ĉu en la Paradizo aŭ en la Infero?
- SERVET** "For la Perrin'anojn el la preĝejo!" Jen kion krias viaj fanatikuloj surstrate. Per ili vi plenigos Saint Pierre. Mian libron vi forbruligis. Miaj legantoj timtremas malantaŭ siaj pordoj. Al kiu mi tie parolu? Ĉu al duonmilo da fareloj?
- CALVIN** Al la Eklezia Arbitraciantaro.
- SERVET** La tribunalo emis absolvi ankaŭ Sokrates. La mortkondamnon eltrudis la fanatika amaso. Ĉar li neis ion, kio estis viva sanktaĵo por la nescio. Li neis la diojn. Ve al tiu, kiu instruas la homojn kun plia rapido ol ili kapablas lerni.
- CALVIN** Kaj ve al tiu, kiu malfrue vekiĝas se lia afero bezonas defendon. Ni lasu do nian diskuton al la historio!
- SERVET** La historio ne plu havas tempon klarigi la veron, ĉar ĉi lasta apartenas jam al vi: al la venkinto.

- CALVIN** Do por kio tiuj cent jaroj?
- SERVET** Dume eble formortos la armitaj provosoj malantaŭ viaj argumentoj. Kvankam mi ne deziras vian malvenkon. Mi skribis nur kontraŭ tio, kio transaktualas ankaŭ en vi.
- CALVIN** Ĉu reformi la Reformacion? Supre netegmentita, fronte nestukita kaj ni jam malkonstruu la domon, ĉar doktoro Servet havas novajn ideojn.
- SERVET** Filozofio de laborestro. Kion atingus nia menso, se la kranio ne konsiderus ĝian kreskadon? Apenaŭ pasis tri jardekoj de kiam Luther ekagis, la movado ankoraŭ infane aĝas kaj vi jam kunkreskigis ĝiajn kraniostojn. Ĉu kreskigis? Morteris, ferumis. Ĝi enhavas nur tion, kion vi enŝtopis. Novigo estas danĝera kaj malutila, diris papo Klemento, antaŭ ol vi venkis en la renovigo de la kredo. Novigo estas danĝera kaj malutila, tondras nun Johano Calvin post kiam ...
- CALVIN** ... post kiam baldaŭ diserigos nin la eksteraj kaj internaj antagonismoj. Do aŭskultu min, malfeliĉa obsedito de Arius! Dum mi pasigas kun vi la tempon, la solduloj de la germanaromia imperiestro galope proksimiĝas. Ni

resumu: ses literoj savos vian vivon: RE-VO-CO²¹. Vi levos vian libron antaŭ kvincent homoj en la preĝejo kaj vi diros, krios, flustros, indiferente kiel: REVOCO. Vi retiros ĝin ekde la unua ĝis la lasta litero. (*La turhorloĝo batas la 11an.*) Mi devas iri.

SERVET Ekde la unua ĝis la lasta litero. La tuton de miaj pensoj ekde lulilo ĝis ĉerko. Do ĉion. Por nenio.

CALVIN Por la vivo.

SERVET Kiu estas pasinta, ja ĝian sencon mi ĵetis antaŭ vin!

CALVIN Kiun vi povas savi de la eterna damno.

SERVET Ni supozu: mi eraris. Kaj kio, se mia eraro batalas kontraŭ la via? Ni estas falemaj, vi pruvas tion tra sescent paĝoj en via Instituto. Eĉ muŝo povas devojigi homon. Do ĉu vi ne estas erarema? Ĉu Dio parolis per vi — pri la mizero de ĉiuj ceteraj?

CALVIN Ne per mi. En mi faras Dio sian laboron.

SERVET Sole en vi. Kaj en mi Satano. Ĉu samurba bapto estas por vi Dio kaj la unusola vero? Ĉu ankaŭ Dio naskiĝis en Noyon? Dio estas Noyon'a akuŝistino, li tondis al vi la umbili-

21 Revoco (*latine*): mi retiras (t.e. instruon)

kan ŝnuron? De kie vi scias, ke li ne estas el Aragonio, kie naskiĝis mi? Aŭ eble vi naskiĝis ne de patrino?

CALVIN Vi inundis min per blasfemaj demandoj dum dudek jaroj.

SERVET Kaj vi ĉiujn prirespondis kun la rigoro de la Ŝtontabeloj kun nuraj krisignoj, sen iometa humilo antaŭ la demandosignoj kaj turmentoj de la esploranta spirito. Jam delonge vi nur instruas, ne lernas; ankaŭ la verkiston mortigis en vi la verdiktisto, kiu enketas ne pri sekreto, sed arestito.

CALVIN Diru ĉion ĉi antaŭ la kunveno kaj mi respondos.

SERVET Ĉar vi estas la pleja respondulo al ĉio kaj ĉiu. Apolono kaj orakolo de Delfoj, aŭgurejo, unupersona koncilio, konklavo — vi sola estas en Ĝenevo la unupersona Ĝeneva demokratio.

CALVIN Tio estas nur akuzo, ne argumento por la vero en via libro.

SERVET Da kiuj vi restigis nur ununuran ekzempleton!

CALVIN Skribu alian! Seneraran. Dio mia, se vi, kun viaj kapabloj aliĝus al ni ...

SERVET Kiel pitagora ŝtipkapulo en la papagokaĝo de la spirita servuteco, ĉu? Kaj vi donacus al mi la diskutmetodon de la mensatrofiaj disĉiploj: Mia aserto estas vera, ĉar la Majstro tiel opinias. Via aserto estas falsa, ĉar la Majstro opinias diference.

CALVIN Tiel parolas Perrin, kies Pitagoro estas vi. Vin citas la misvalora disĉiplo. Anstataŭ la unusola Dio ekzistas trikapa monstro. Magister dixit, tio estas doktoro Mikelo Servet, kiun mi ne povas plu ŝirmi, ĉar li multobliĝis. Kiom da falsaj opinioj, tiom da Mikeloj Servet vivas en ĉi tiu urbo. El soleca persono vi fariĝis epidemio de pensoj. Sed mi bridos vin. Mi dekoktos, seninfektigos salelesive la animojn tuŝitajn de vi. Ni daŭrigos en Saint Pierre, kiel mi promesis al mia malfeliĉa Idelette. *(Li preparas sin foriri.)*

SERVET Ankoraŭ vorton, Johano! Senhonorigu min, sed ne tuŝu mian verkon! Mian libron. Mi ne trovis la sidejon de la animo en la sangotuboj. La animo loĝas en ili pli profunde. Eble ĝuste tie kie la verko naskiĝas; de kie la koloroj de Leonardo elfajras, la statuoj de Michelangelo elmergiĝas. Mi ne scias, kie mi trovas ĉi tiun profundon, eble en mia sorto.

Mi ne povas sekci nian sorton. Sed certas, ke ĉiu skribita vorto mia estas la lasta rifuĝejo de mia sinkonservo. El ordinara materialo, farbo, papero konsistas ĉi tiu libro, mia libro: efemera formo, ovoŝelo, amnio, sed en-aŭskultu: la senco de la vivo ploras en ĝi. Mi unuas kun ĝi, Johano, kiel patrino kun sia embrio. Revoco? Ĉu vi deziras, ke mi faru min embriomurdisto?

CALVIN Via embrio? Herezulo kraĉanta sur la Dian vizaĝon.

SERVET Vi diros tion antaŭ duonmil fanatikuloj. Min vi ne konvinkos, vi mortbatos min per ili. Ne hastu, aŭskultu min! Ni prokrastu la diskuton, ankaŭ la publikan. Por ĉiam.

CALVIN Nun ne plu eblas: *Alea jacta est*²². Ŝtormu sur nin la fortakvo de Dio. (*erupcie*) Kial vi venis ĉi tien? Kial? Kiomfoje mi mesaĝis, petegis: ne venu, restu kie vi estas, disputu sola kun Dio — Li povas pardoni vin. Mi ne povas, mi ne disponas tian potencon, nur devon. Mi havas nenion, eĉ ne eron da ĝojo, nur la kruco de la devo pezas sur mi ...

22 *Alea jacta est* (*latine*): La kubo estas ĵetita (t.e. la decida paŝo farita).

SERVET *(persvade, kun infana naiveco)* Mi trovis elvojon. La fadeno de Ariadna²³ ĉi tie estas en mia mano, Johano. Aŭskultu min, Johano! Iam vi estis Lucanius kaj mi Villanovus. La libron, la Restitutio verkis Mikelo Servet, ne Villanovus. Enviinte la gloron de la famiĝinta Servet, mi, Villanovus komencis sieĝi vin per diskutigaj leteroj pseŭdonime, do en la nomo de Servet. Ĉar mi opiniis, — tiel mi rakontos al viaj prokuroroj — ke tiamaniere via respondo pli certos. Ĉu vi komprenas, Johano? Via fidela adepto, studenta kamaraĉo Villanovus kun la nescio de petolema infano volis elprovi Johanon Calvin per herezo mimita, en la nomo de Servet. Entuziasmigita pro sia sukceso, tio estas viaj koleraĵaj respondoj, li entreprenis novan petolon: en la nomo de Servet li vizitis vin kun la libro de Servet — por provoki novan diskuton. Por elprovi denove la ŝarĝeblon de viaj konvinkoj, el nura scivolo. Ĉu vi komprenas? Ni diru, la zurikanoj nekredantaj al vi en kelkaj punktoj elektis min kiel allogilon, en la figuro de Servet. Sed nun ĉio malkaŝiĝis; ĉi-nokte kuriero venis el Zuriko kaj informis vin pri

23 fadeno de Ariadna: fadeno, per kiu oni povas eliri el labirinto

la trompeto: atentu, la homo falinta al vi en la manojn ne identas kun la herezulo Servet! Neniel bruligu lin! Kuŝigu lin sur punbenkon, detranĉu la orelojn al la trompulo, sed neniel bruligu lin, li ja ne indas tion. Kaj pruvoj? La tribunalo de Vienne ne povis konstati kun absoluta certeco ĉu Villanovus identas kun la fifama Servet. Ankaŭ De la Fontaine povas atesti tion. Ankaŭ li konis min kiel Villanovus. Estis eraro, kio okazis al ni; do iru, kuru, Villanovus! Servet neniam revenos ĉi tien, konservu lin en la memoro de via malamo! Mi foriros de ĉi tie, Johano, en la plej malproksima angulo de la mondo mi kuntiros min, ie inter miaj samsortanoj, mi: herezulo en siaj konvinkoj. Vi serĉigos kaj ne trovos min kaj venos la lasta horo ankaŭ por vi kaj dum minutoj de via agoniado vi trovos min — en vi. Kontraŭ morto kaj dubo ne ekzistas medikamento. Tiam vi komprenos: mi povus esti via daŭriganto ... (*entuziasme*) Lucanius! Lasu min adiaŭi vin — kiel Villanovus!

CALVIN

Neniam plu mi povos esti Lucanius. Do la embrio estas ne la via.

- SERVET** Mia, sole mia, do mi ne povas revoki ĝin. Sed min mem, ĉi tiun mizeran elpolvaĵon, eĉ se ĝi nomiĝas Mikelo Servet, mi povas revoki. Mi povas malkonfesi!
- CALVIN** Tio do estas la lasta ŝirmejo por nia memkonservo en la malpuro de mizera mensogo kaj malkuraĝo. Vi farus min el kontraŭulo via kunkulpulo kaj samtempe vi malaltigus vin.
- SERVET** Ĉar mi timas, timas la fajron.
- CALVIN** Se iam mi priploros vin, mi priploros vin nur pro tio. La verko estas neretirebla, sed vi entreprenus malkonfesi ĝian aŭtoron.
- SERVET** Por ĉiam ĝi restos inter ni.
- CALVIN** (*montrante al la ĉielo*) Kaj la tria? Kiel mi respondos pri vi antaŭ Dio? Vi nur humiligas vin: mi fordonus mian animon por mizera marĉandado.
- SERVET** Mi prefere humiligas min ol ĉi tiun malfeliĉan, persekutatan libron, kiu jam vekigis je propra vivo. Se mi retiros, mi neniigos ĝin. Se mi neos ĝin, ni nur disiĝos. Ne estas kriterio por la vero, kies nomo ornamas ĝian frunton. (*kun amara ironio*) Mi donacas ĝin al vi, envicigu ĝin inter la viajn ...

- CALVIN** Grandanima vi estas. Mi deklariĝos vin frenezulo. *(Li ekiras.)*
- SERVET** Atendu ... *(Haste li prenadas skribaĵojn de sur la tablo.)* Miaj argumentoj, dokumentoj ... Ĉu ne kune ni iros al la debato?
- CALVIN** Venos por vi Farel.
- SERVET** Ni devus iri kune. Sola mi timas. Viaj fanatikuloj ... Mi petegas vin, ne incitu ilin kontraŭ mi! Parolu vi sola! Se Farel blekas, la menso paraliziĝas al mi ...
- CALVIN** Li ne blekos.
- SERVET** Se Farel komencas boji, la odoraĉo de brulanta karno trafas mian nazon, mi ne vidas, nur krampiĝantajn internaĵojn, miajn blindiĝe blankajn ostojn, mian baraktantajn pulmojn inter la flamoj, mian vizaĝon eksplodantan kiel porcelana vazo ... Lasu min nun iri kun vi, Johano!
- CALVIN** Idelette fartas malbone. Unue mi devas iri al ŝi.
- SERVET** Sed ne Farel ... Memoru kion vi promesis al Idelette!
- CALVIN** Iru sola! Aŭ akompanate de Perrin'anoj. Sed kun via permeso mi fermigos la pordegojn de la urbo. *(For.)*

SERVET Mi iros libere ... Al libera, publika debato!
Ĉiopova patro, estu al mi proksime ...

En la juĝejo

FAREL *(al De la Fontaine)* Transdonu mian ordonon al la karcerestro: ĉu sinjoro Perrin, ĉu la enketisto instrukcios, ke sinjoro Servet estu kondukita en la preĝejon, la arestito restu samloke, ĝis plua ordono.

DE LA FONTAINE Sed sinjoro ... La Majstro diris ...

FAREL Al Majstro Calvin mi klarigos la aferon. Herzulo ne rajtas meti la piedojn en konsekri-tan domon de Dio. Finite.

DE LA FONTAINE Komprenite. *(For.)*

Pupitro

**Denove eksonas sonoriloj. Kanto de Galeruloj.
Calvin suriras la pupitron. Silento.**

CALVIN Indulgu nin, Ĉiopova Dio, por ke ni transdonu nin humile al Vi, ne infektu la servadon per propraj pensoj kaj restu obeemaj en Via volo! Amen.

La prezentado ekde nun fariĝas iufoje polifonia: parolo de Calvin, teksto de Farel diktata de li al predikisto kaj furiozado de Servet en la karcerro. La tuta scenejo vidiĝas en lumo, escepte la kampon Champel.

SERVET Gardisto, jam pasis la 11-a! (*Ekscitite li vestas sin, poluras la ŝuojn kaj prenante siajn dokumentojn, preparas sin al la debato.*)

CALVIN Kunhomoj miaj, fratoj en la Sinjoro! Malfacilaj tagoj ekpezis sur ni, denove ni devas fronti la malamikojn de la reformacio. Nun kiam niaj junaj samkredanoj kun la vortoj de la naŭa psalmo paŝas sur eŝafodon, nun kiam la hispanaj solduloj de imperiestro Karolo marŝas kontraŭ Ĝenevo por subjugi nin al Romo kaj kiam pafdistance de niaj limoj episkopo De la Baume preparas sin por nova amasbuĉado, memoru miajn ĉiamajn avertojn: virinoj, viroj, junuloj, aĝuloj, malriĉuloj kaj patricioj, ni ĉiuj perdiĝos, se ni ne unuigis. La nesto de idoladorado, Sodomo kaj Gomoro estis ĉi tiu urbo, en suferoj kaj bataloj ĝi fariĝis modellando de la Sinjoro dum dekkvin jaroj. Ni sangabunde oferis por ĝi; viaj amatoj — martiroj de la purigita evangelio lasis trapiki al si la langon, elektis pre-

fere la pendumilon ol denove diri Ave Maria²⁴.

SERVET Gardisto! Mi volas paroli kun la karcerestro!
(La gardisto restas senmova kaj silenta.)

CALVIN Nia ofero alportis fruktojn. La Sinjoron ĝojigas rigardi sur nin. Kunfratoj miaj, vi bone scias, ke mi ne trompas min per iluzioj, mi ne plezuriĝas per la vido de mia propra vizaĝo, do rakontu aliuloj kiel feliĉige doni kalkulon pri la ŝanĝoj de la novaj tagoj. Opiniu pri ni, anstataŭ ni, per vortoj de spontanea direndo, Vergerius, la papista eksepiskopo de Istrio. Jen miaj fratoj (*legas*): Ho, kiel kortuŝa komunumo troviĝas en Ĝenevo! Se eksonas la sonoriloj, la komercistoj tuj fermas siajn vendejojn, finas la laboron, ekdirektas sin al la plej proksima preĝejo por kanti psalmojn de David, aŭskulti la Vorton.

SERVET Gardisto, mi devas paroli en la preĝejo. Ĉu vi ne komprenas? Ĉu vi ne aŭdas, hundo? Mi denuncos vin, fripono!

CALVIN Ili glorigas la Sinjoron en la gepatra lingvo, sen perantoj kaj nekompreneblaj latinaĵoj, en la libereco de esprimiĝo.

24 Ave Maria (*latine*): Saluton, Maria (komencaj vortoj de unu el la plej konataj katolikaj preĝoj).

- SERVET** Gardisto, voku Calvin, la mizeran vortrompulon! (*La predikistoj kaj Perrin en katenoj eniras la juĝejon.*)
- FAREL** Mi petas vin aŭskulti la decidon de la defenda komisiono pri la afero de sinjoro Perrin. En nia minacata stato por la sekureco de la urbo li estu arestita.
- CALVIN** (*Dum la poliestro forkondukas Perrin.*) Ho, Ĝenevo! Estu benata, kiu ĉesigis la paganecon inter viaj muroj. Estu benata, kiu post miljaro alportis la orepokon de la libera esplorado. Ĝis ĉi tie la letero, post kio mi demandas: kie vi estas, Mikelo Servet, vi monstro konstruita el naŭza herezo; anabaptista, panteista, kontraŭ-Triunua rompanto de nia paco kaj unueco? Ekstaru antaŭ ni, lasu min prirespondi viajn blasfemajn demandojn! Montru vin al la komunumo, por ke vidiĝu la vizaĝo de tiu kiu, kvankam demetis la papon, sed ne surprenis Kriston kies diecon li neis en sia fiverko Restitutio Christianismi.
- VOĈO** Kie li estas? Ni vidu lin!
- CALVIN** Bedaŭrinde, vi vidos lin. Baldaŭ li alvenos.
- SERVET** Gardisto, provoso, ŝtatsekretario, karceres-tro! Kie vi estas, Calvin? Mi pruvos per viaj propraj agoj ke vi estas murdisto kaj kovard-

ulo, vi ne kuraĝas entrepreni publikan debaton. Mi ne plu timas la morton, ĉar mia afero estas prava, vane vi krias kontraŭ mi kiel blindulo en la dezerto.

FAREL

(Al predikistoj sidantaj ĉe la tablo kiuj voĉdonas akcepte pri ĉiuj punktoj, levante la manon.)

Bazelo: kontraŭ. Zuriko: kontraŭ. Ŝafhaŭzeno: kontraŭ. Kaj ili aldonas: liberigu nin de la naŭza herezulo!

CALVIN

Eĉ nur aŭdante liajn demandojn, konsterniĝas ĉiu honesta kristano. Jen lia unua demando, kiu estas samtempe ankaŭ insida respondo: Ĉu la krucumita homo, do Jesuo estas filo de Dio kaj se jes kial? Aŭdu! Kial? Lia dua demando: Ĉu la regno de Kristo estas en la homoj kaj se jes, kiam oni alvenos tien, kiam oni renaskiĝas? Ĉu vi atentas? Kiam oni renaskiĝas? Mia respondo: kiam ni liberigos la eklezion de li kaj samspeculoj. *(Rido.)*

SERVET

Vi misinterpretas ĉiun mian vorton, ĉar venĝemo bruligas al vi la koron kaj vi mensogas, mensogas, mensogas, senscia, insida kalumnianto. En vi ekŝaumas kolero eĉ pro plej milda opono, ankaŭ en aferoj de vetero. Kie

vi estas, Dio, kie vi estas, Kristo, kiam en via nomo oni pelas senkulpulojn en morton?!

FAREL

(Diktas al la intertempe aperinta De la Fontaine.) Antaŭ niaj potencaj sindikaj moŝtoj kaj juĝistoj de nia urbo, laŭ peto de la privata akuzanto Nikolao de la Fontaine, la 26-an de oktobro en la 1552-a jaro de la Sinjoro finiĝis la proceso kontraŭ Mikelo Servet de Villanova, origina el la hispana reĝlando Aragonio. La malkaŝaj konfesoj de la akuzato konfirmis ĉiun punkton de la akuza dokumento. Lian libron plenan de herezoj, kiun li presigis sekrete, la ekleziaj konsilioj de la fraturboj, kune kun siaj Ĝenevaj fratoj akceptis kun konsterno kaj indigno ...

CALVIN

Tria demando lia: Ĉu necesas kredo por bapto kaj kion celas la sakramentoj en la Nova Testamento? Ĉu vi bone atentis? Ĉu necesas kredo por bapto? Neante la ĝustecon de la baptado en la infanaĝo li rebaptigis sin en sia trideka jaro. Imagu, kiel subakvigis lin, ĉi tiun barbozan suĉinfanon baptopatro Satano kaj pabtopatrine iu ina diablo! *(Erupcia rido.)*

SERVET

Donu okazon, okazon ke mi refutu viajn malamatajn mensogojn! Bruligo de libroj ne

estas respondo! Respondo al nenio! Mortigo ne egalas konvinkadon! Je amo de Dio mi petas vin, konvinku min pri miaj eraroj, konvinku min, konvinku min, konvinku min! Ĉu la ĉielo ne falas sur vin kiam vi deklaras herrezuloj viajn personajn malamikojn?

CALVIN Kvara demando lia. Kaj kio, se ĉi tiuj sakramentoj estas nur alegoriaj? Alegoriaj, do neesencaj; malsaĝaĵoj, papistaj ceremonioj ...

VOĈO Al fajro kun li!

CALVIN Kvina demando lia: Kial la alveno de Kristo estas graco kaj ĉu antaŭe niaj prauloj estis en la infero? Demando insida samkiel serpento en herbo. Ĉi tiu babilona malvirgulo de la pensado malĉastanta per siaj duboj, kiu jam junaĝe prostituite cedis sin al ĉia vagabonda ideo fremda, estas fakte mizera fenomeno de la infero de Dante: Malpleno, Truo, Nenio. Sed danĝera malpleno por religie blindaj; lia nenieco estas danĝero por ĉiu nefirmulo. Lia pliboniĝo ne plu espereblas. Nur pere de li ni povas bari la ĝeneralan dismoraligon.

VOĈO Al pendumilo kun li!

SERVET Kial ne frapas vin la fulmo de Dio, animuzurpantoj, alproprigantoj de la vero grasi-

ĝintaj je akuzado? De kiu vi aĉetis min? Ĉu de mia patrino, patro, en sklavfoiro? Mi naskiĝis ne por bredado, sed por pensado. Mi naskiĝis homo, kiu volas disponi ne nur sian korpon; sed ankaŭ siajn pensojn. Kie vi, Calvin, dio de respondoj? Kiu rajtas devigi iun ajn demeti la malliberecon de sia konvinko en la nomo de via libereco? Kun apostolo Paŭlo mi ĵetas en viajn okulojn: ĉiu estu la ligito de sia konscienco. Konvinku min, konvinku min, se mi eraras!

FAREL

Ni, sindikoj, kriminalaj juĝistoj de la urbo, surbaze de la proceso okazigita kontraŭ vi, konvinkiĝinte, ke malgraŭ ĉiu admono kaj atentigo vi disvastigas falsajn, herezajn instruojn kaj kontraŭagas la fundamentajn principojn de la kristana kredo, estigis skismon kaj konfuzon en nia eklezio kaj ne hontis publike dissemi vian instruon al la mondo ...

SERVET

Ĉu mi eble ne havas argumentojn? Polycarpus, Klemento kaj Tertullianus ...

CALVIN

Klemento neniam diris ion tian. Ankaŭ Cyprianus asertas la kontraŭon. La nocio de la Triunuo estis akceptita jam antaŭ la Nicea koncilio.

- SERVET** Kie vi estas, Aristoteles por ĵeti al ili en la okulojn: Platon karas al mi, sed pli karas la vero ol li ... mia turmento, mia vero. Kara patrino, kial vi naskis min al ĉi tiu kruela mondo! (*Refalas en sin.*)
- CALVIN** Sed por kio ĉio ĉi se li mem konfesas siajn misirojn?!
- VOĈO** Li konfesu! Antaŭ ni konfesu!
- CALVIN** Li konfesus, se li ne forkurus ankaŭ ĉi-foje antaŭ la publika debato. Duafoje vi trompis min, Mikelo Servet. Dua- kaj lastafoje. La Sinjoro turnu sian vizaĝon al vi kaj kompartu vin, amen. (*Kanto de Galeruloj.*)
- FAREL** Ne, ne, ne! Ni ne povas konsideri lian junaĝon! Kiu ekstermas la vulpon, ekstermu ankaŭ la vulpidon antaŭ ol la ruzo maljuniĝus en ĝi. Mi ne dubas pri lia kulpeco kiel mi ne dubas pri Dio. Se necesas, mi farigos tamburon el mia haŭto: tiel mi anoncos ĝis mia morto, ke li estas herezulo. Ĉu nur Liono, Romo kaj Madrido rajtas sendi niajn plej bonajn filojn al aŭtodafeo? Ĉu Ĝenevo ne rajtas havi herezulojn por demonstri ekzemplon? Ĉu respondi ne estas nia devo? Skribu, La Fontaine!

Kampo Champel

Sonoriloj sonas. Granda amaso marŝas al kampo Champel kie la brulŝtiparo staras preta. Veronika kun floro en la mano. Ekzekutisto pliĝustigas la lastajn ŝtipojn. Tribuno, predikistoj vice sidantaj. Farel aperas alrapide, transdonas la tekston de la verdikto. Venas Mikelo Servet kondukata de du tribunalaj servistoj. Subaksele lia libro. Oni starigas lin antaŭ la eŝafodon, kontraŭ la juĝista tribuno. Je mansigno de Farel paŝas Darlot sur la tribunon. Silento.

FAREL

Fratoj miaj! Turmentoplenaj monatoj pasis, de kiam la nekonata vagabondo forkurinta el la malliberejo de la franca inkvizicio, alveninte sur luita ĉevalo, kun rimedoj de la spirita putvenenado, kiun li nomis reformado de la kredo ekloĝis en la gastejo Al la Rozo kaj malgraŭ plurfoja rifuzo far nia Majstro li alsturmis lin per krudaj akuzoj por gajni nin por siaj herezaj instruoj. Nur lia naiva kredemo povis superi lian aŭdacon, kiam li esperis surprizi Calvin kaj la sentinelojn de nia reformita kredo en dormo de nescio. Ni deŝiris la maskon de lia nekonateco. Jen, vi povas nun prijuĝi la misfaman Mikelon Servet, kiu havas survizaĝe la malbelajn trajtojn de la kontraŭkristana skismemo. Ĉiuj povis legi la pekliston de liaj agoj kaj falsaj opinioj

pendigitan sur la pordego de la urbodomo. Sed vi ne povis legi la turmentojn de niaj multaj tagoj kaj sennombraj noktoj, kiam rezulte de duelo inter pardonemo kaj punivokaj faktoj ni povis pridecidi la justan, ununure eblan verdikton, eĉ kontraŭ la Perrin'anoj.

VOĈO Kie estas Auber Perrin?

FAREL En la meritita loko, en karcerio. Liaj adeptoj kiel ratoj diskuris. Kiu ankoraŭ volas scivoli, montru sin. Ni vidu la restintajn serpentojn! (*Ektima silento.*) Ni plenumis doloran devon. Sindika moŝto Domin Darlot, koniguan finan decidon.

DARLOT Akuzato, genuiĝu!

SERVET Sole antaŭ Calvin kaj Dio.

FAREL De Dio vi forturnis vin, Calvin vi rifuzis. Vi staras antaŭ la Leĝo.

SERVET En kontraŭleĝeco.

DARLOT (*Post kiam Farel mansignas al li.*) Mikelo Servet, vi pruviĝis kulpa en terura, grave indigniga, aninvenena misagado. Vi domaĝis nek penon nek pasian, obstinan argumentadon por infekti la mondon per viaj herezaĵoj kaj stinka veneno de viaj ideoj. Grava, naŭza

estas via kulpo, peko kiu meritas severan korpan punon. Ĉar ni volas purigi la Dian eklezion de la infekto kaj fortranĉi de ĝi la putran membron; post kiam sufiĉan tempon ni konsiliĝis kun niaj kuncivitanoj kaj la nomon de Dio ...

SERVET De la perforto!

DARLOT ... ni vokis por helpo por povi eldiri pravan verdikton en la nomo de la Patro, Filo kaj Sankta Spirito ...

SERVET En la nomo de la spirita embriomurdo ...

DARLOT ... fidele al la leĝo kaj pruvinte ĉiun vian herezaĵon, per jena decido nia ni kondamnas vin, Mikelo Servet ...

SERVET *(falinte surgenuen, alpremante sian libron)* Dio mia ...

DARLOT ... ni kondamnas vin, Mikelo Servet, esti kondukita en katenoj al kampo Champel kaj ligite al fosto esti viva bruligata kune kun viaj libroj sur malrapida fajro — á petit feu — ĝis via korpo cindriĝos. Tiel finiĝu via vivo por eterna admono al tiuj, kiuj pekus simile. Amen.

FAREL Ni preĝu! *(La amaso genuiĝas por silenta preĝo dum tribunala gardisto ligas Servet. Kaj*

kiam oni volas forpreni lian libron, li dumane alpremas ĝin al si.)

SERVET Murda mano ne tuŝu mian libron! Mi petegas vin, kondamnu min ne al fajro, sed al perglava morto. Glavon! Havu koron! Eĉ se rustan, neakran, foruzitan, breĉitan glavon!

FAREL Glavumo cediĝas nur al murdintoj. Kontraŭ ses literoj vi elmeritos ĝin. Revoco. Alie atendas vin duobla morto ... La dua transmonde. Revoco! Indulgu vin! Via mizera karno ja ĉiel pereos. Indulgu vian animon, ne estu ĝia tirano se vi ne plu povas esti ĝia portanto.

SERVET Ĉi tiu libro fontas el mia animo. Mi ne rajtas malhonoru ĝin. Ho, se nur mia lango cindriĝus kiel unua, por ke la doloro ne eldirigu per mi viajn naŭzajn ses literojn! Se mi eldirus ilin — atestu por mi, bonaj homoj! — tiu ne plu estos mi. Tio estos sonoj de miaj pulmoj, hepato, ostoj; mi ne akceptas, senvalidigas tion! Glavon, pendumilon mi petegas, mortigu la homon, kiu mi estas, sed kompatu la junulon, kiu mi estis. Mia tuta juneco enestas inter la muroj de ĉi tiu libro. Detranĉita kapo, kadavro malvarmiĝinta sur pendumilo, ĉu ne sufiĉa kompenso por vi?

FAREL Revoco!

(Calvin venas rompite.)

SERVET Johano! Lucanius! Misericordia!²⁵ *(Ĵetas sin antaŭ lin.)* Misericordia! Vi ne havis kuraĝon aŭskulti mian lastan argumenton.

CALVIN Retenis min ne malkuraĝo, sed morto. Mia edzino mortis. Idelette mortis. Stariĝu!

SERVET *(Ne stariĝas.)* Pardonu min! Pardonu, ke en mia soleco mi ĝenis vin sen inda kaŭzo. Al kiu mi povus turni min, mi ja estas el inter vi. Rajte de la lasta vorto mi diras: ankaŭ mi estas el inter vi. Apartenas al vi, kiu estas la kaŭzo de mia perdo. En la sino de Romo mi estus povinta senti min sekura, anstataŭ mi perantoj aranĝis ĉiun aferon mian kun Dio; en mia nomo kaj anstataŭ mi ili legis kaj pensis ĝis vi venis kaj konsternis nin, konsciigante nian individuan respondecon. Vi donis al mi la Skribon en la manojn, la falsitan revelacion kaj per tio trudis al mi solecon, transdonis min al la tribunalo de miaj propraj pensoj, Johano. Vi deŝiris de ni la senvaloran dekoron, turnis al ni la vizaĝon internen, devigis fariĝi interna homo en la abismo de la pensado, en ĉerka soleco. Ni ri-

25 Misericordia! (*latine*): Indulgon!

cevis la gracon en grego, el aliula buŝo dum vi ne bruligis la indulgencojn, por ke sub turmentoj de la individua memkonfeso ni haku ŝtupojn sur nia propra dorso por nia ascendo. Pli frue aliaj surprenis nian respondecon kaj vi ordonis al ni, ke ni mem akceptu nin. Mi laŭagis. Refoje kaj denove mi elŝiris min el la timo de la libera esplorado ... vi instigis min ... Al verkado vi instigis min ... Vi diris: la vento ne rompas fendiĝintan kandon, ne estingas bruletantan kandelon. Estingas, Calvin. Kial mi ne povas diri ankaŭ pri vi: nur en songo mi parolis kun la reĝino?

CALVIN

Ĉar ankaŭ pri niaj songoj ni respondecas.

SERVET

Terura krueleco.

CALVIN

Por la fina graco. Por la afero, kiu disponas kaj nian vivon kaj nian morton. Se vi centfoje pravus: eĉ tiam mi ne povas forlasi la TUTON por ĝia PARTO, kiu estas vi hodiaŭ kaj povos esti mi morgaŭ. Pro individuaj koleroj mi persekutis vin neniam — mi mem estas persekutato kaj povas kun vi diri kiel kredon de la reformacio: la vento ne estingas bruletantan kandelon. Mi diras kun vi kaj demandas sola: kiu donacas al mi la flugilojn

de kolombo, por ke mi forlasu ĉi tiun urbon kiu estas konfidita al mi por ĝismorta respondecado kaj kies sinjoro mi ŝajne estas, kvankam mi estas nur ĝia krucumito, sur la kruco de devigoj. Mi akceptis, mi mem eltrinkas ĉiun amaran kalikon de mia ofico. Ĉerko atendas vin, mi deziras al vi la gracon de Dio ... *(For.)*

VERONIKA *(Ĵetas sian floron sur la ŝtiparon, kuras al Servet kaj plorante kisas lin.)* Dio mia, sinjoro doktoro, sub kiel malbona konstelacio vi naskiĝis. *(plorskuate)* Kial vi rifuĝis al amikoj, kial ne al malamikoj? Sinjoro doktoro, amata sinjoro doktoro, kie Dio nun forrestas? Kie la vera, brila Ĉiopuvulo?

SERVET Ne demandu, Veronika, ĉar malplenas miaj okuloj, malplenas la ĉielo; mi ne plu scias, kie estas la brila Ĉiopovulo, ĉar Li forlasis min, pelis en revadon kaj lasis min sola kun miaj demandaj frazoj kaj mi ne scias: ĉu li levis aŭ terenbatis min, kiam li kondukis min en ĉi tiun urbon — ne atentigante: dormu kun malfermitaj okuloj, Mikelo Servet! Kiel vaksopupoj, kiel ludfiguroj! Inter la muroj de la Nova Jerusalemo dormu kun

malfermitaj okuloj, bonaj homoj! Kiel vak-
sopupoj. Kiel ludfiguroj. Bonan nokton.

*(La ekzekutisto flankenŝovas Veronikan. Servet
ekiras al la eŝafodo. La amaso komencas la
Kanton de Galeruloj. Sonoriloj sonas en la turoj
de Ĝenevo.)*

KURTENO

Rimarko de la aŭtoro

Legantoj kompetentaj en la prireformacia literaturo povus riproĉi la aŭtoron pro eraroj pri faktoj, ekz.: Servet ne kalkuleblas al la junaĝaj amikoj de Calvin; la leterojn de Servet al Calvin transigis al la inkvizicianoj ne Farel, sed Guillaume de Trie; la sekretario de Calvin en Ĝenevo, De la Fontaine, estis neniam sekretario de la ĉefepiskopo de Vienne; Calvin — kiam li devis fuĝi el Parizo kun rektoro Copus — estis savita ne de la armitoj de Margareta de Navarra; tio estas pli malfrua turno de lia vivo, kiam lin savis dukino Renata en Ferrara el la ungoj de la inkvizicio ktp. Estas vaste konate ankaŭ, ke Idelette de Bure, edzino de Calvin dum la Ĝeneva proceso kontraŭ Servet en 1553 ne plu vivis; ŝi mortis en 1549. La tempa aŭ loka ŝanĝo aŭ nuanca modifo de ĉio ĉi estis nur postulo dramaturgia.

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-167-4